

BULGARA

2 • 1981

ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO





E-societo „Nova Mondo“ — v. Borima (distrikto de Loveč) organizis E-kurson kun 16 partoprenantoj, precipe gejunuloj. Ĉiuj abonis al „Bulgara Esperantisto“.

Redakta komitato:

Dončo ĤITROV (ĉefredaktoro), Vasil BOROVSANSKI, Dimităr DENĈEV, Evgeni GEORGIEV (sekretario) Dimităr ĤAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Ĥaim LEVI, (vicĉefredaktoro), Flori NIKOLOV.

Administranto: Metodi GAREV

Korektis: Evgeni GEORGIEV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919 j.
Eldonkvanto 6100.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97,
1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66
1000 Sofio

tel. 32-40-68, 31-00-29

Sur la kovrilpaĝo: Amikeco trans limoj.

ENHAVO

* * Kongreso partia, kongreso tutpopola .	1
Dimităr Papazov. Por viglaj kaj agemaj	
Distrikta Estraroj	2
W. Christ. Tagoj de Bulgario en GDR . . .	3
Dimităr Canev. Duobla E-jubileo en Popovo	3
Dončo Ĥitrov. Bonaj perspektivoj por la so-	
fiaj e-istoj	4
Petko Arnaudov. Matematikista konferenco-	
simpozio	4
Saša Nedeva. Unika renkontigo	5
Tibor Sekelj. Pretigi la grundon por nova	
elpaŝo	6
Ĥaim Levi. For la neŭtrona bombo!	7
* * Eta enketo: La lingva problemoj kaj	
Esperanto.	7
D-ro P. Boev. Kiel aperis la slavoj	8
Ĥristo Gorov. Nefleksebla kiel ŝtalo . . .	9
L. Miĥajlov. Pri la neologismoj.	10
Nikola Aleksiev. Memorigo pri rimarkinda	
E-poeto	11
Kunčo Valev. Scienca agado kaj Esperanto .	12
N. N. Popolorkestroj en Torun	13
E. M. Belegaj impresoj	13
Cvjatko Todorov. 20 tagojn en la lando de	
500 insuloj	14
Ran Bosilek. „Panjo ĝin trikis al mi“ (por	
via lingva perfektigo)	15
* * Jubileo de sovetaj veteranoj	16
* * De lando al lando	16
* * Tra la gazetaro	III
* * Deziras korespondi	IV

NIAJ PERANTOJ

ALFABETE LAŬ LANDOJ

Britio, Covenham Louth, Lincs, LN 11 OPF
Laycroft Main Road, s-ro Paul Hewitt
Ĉeĥoslovakio, Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jiřska 10, 110 00
Praha 1.
Ĉeĥoslovakio, 040 01 Košice, Šmermova 35/1, Esperan-
tisto Slovaka, Daniel Papak
Francio, F-54510 Tomblaine, B. P. 23,
s-ro Roger Degrelle
ĝirkonto 771.77 R, NANCY
Jarabono 20. — f. i.
Finnlando, PL 221, SF 70 101, Kuopio 10,
Finna Esperanto-librejo
Germana Demokratia Respubliko,
DDR 108 Berlin, Charlottenstr. 60,
Cenra Laborrondo Esperanto
Germana Fed. Respubliko, Esperanto-eldonejo Palatina
kklr Iggebach, Schlossgasse 30, poŝtekonto n-ro 1658
48-678 ISHFN D-6731 Elmstein

Jarabono: 8 gmk.
Hispanio, Gijón Asturias, Ramon y Clal,
44-3° — Izqda, s-ro Adonis Gonzales Meana
Jarabono: 300 ptoj
Hungario, „Budapeŝta Informilo“, p. k. 153, H-1443 Bu-
dapest
Kubo, Ciego de Avila,
apartado 223, Pedro P. Lamas Diaz
Nov-Zelando, N. Z. Esperanto Assn. book dept. 180
Onepu RD, Lyall Bay Wellington.
Portugallio, Portugala Esperanto-Asocio, R. DR. Joao
Couto, 6 R/C. A P — 1500 Lisboa
Jarabono: 260 eks.
Sovet-Unio, 200016 Tallinn, Estonio, do vstrebovanija
Johannes Palu
Jarabono: 5 rubloj
Vjetnamio, Hanoi, 222 Dôl Càn,
Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio



KONGRESO PARTIA, KONGRESO TUTPOPOLA

Nia laborama popolo ĉiam kaj ĉiufanke subtenas la politikon kaj la farojn de la elprovida batalavangardo de la bulgara laborista klaso — la Bulgara Komunista Partio. Tiel estis ankaŭ en la gloraj Septembraj Tagoj de 1923 j. dum la unua en la mondo Kontraŭfaŝisma ribelo kaj dum la teruraj jaroj de la faŝisma teroro. Partio kaj popolo iris man'n mano al la glora tutpopola venko je la Naŭa de Septembro 1944 kaj dum la jaroj de paca socialisma konstruado de nova socio, de vera demokratio, de socio sen ekspluatado, perforto, sen mizero kaj senlaboreco.

La kunvoko de la XII kongreso de la bulgaraj komunistoj estas grandega evento en la vivo de la popolo, de nia socialisma ŝtato. La kongreso okazos dum la tagoj de la 25-jara datreveno de la historia Aprila Plenkunsido de CK de BKP, restariginta la Leninajn principojn de partia vivo kaj gvidado, ĉiuspekajn eblecojn por ĉiufanka popola ofensivo surkampe de la pablaboro. Oni okazigos la XII kongreson en jaro, kiam la tuta bulgara popolo kaj ties amikoj tra la mondo honorigos la 13-jarcentan jubileon ekde la fondiĝo de la bulgara ŝtato. Dum tiu jaro la bulgara popolo celebros ankaŭ la 90-jariĝon ekde la fondo de BKP kaj la 100-jaran datrevenon de la elstara filo de Bulgario, la eminenta aganto de la internacia laborista kaj komunista movado — la heroo de la Lejpciga Juĝproceso Georgi Dimitrov.

La plej supera partia kaj tutpopola forumo raportos pri la trairita vojo de la XI ĝis la XII kongreso, pri la atingitaj sukcesoj dum la jaroj de la sepa kvinjara plano. En la baza kongresa raporto same kiel en la Tezoj, kiujn la kongreso akceptos, estos projektitaj vojoj al plua evoluo de la socialisma socio en Bulgario, estos pritrakitaj kaj aprobitaj novaj

rimedo por plua disvolviĝo de la ekonomio kaj plua altiĝo de la popola bonstato.

La grandega interesiĝo pri la problemoj, kiujn oni traktos en la XII kongreso de BKP, evidentiĝas el la tutpopola diskutado pri la Tezoj, kiujn akceptos la kongreso, el la krea entuziasmo, ekposedinta ĉiujn laborulojn. En la opinioj, proponoj, rimarkigoj kaj kritiko estas koncentrita la penso, matureco, sperto kaj fido de la popolo, kiu konscie kaj konvinke sekvas sian batalavangardon — la partion de la bulgaraj komunistoj.

La bulgaraj e-istoj preparas sin renkonti inde la XII partian kongreson kun kreado kaj aŭdaco, kun novaj sukcesoj en la laboro. Kiel veraj patriotoj kaj sinceraj pacamantoj, ili scias, ke plej konvinka pruvo pri tio estas la faroj, la sukcesoj en la laboro. En tiuj memorindaj tagoj de tutpopola entuziasmo kaj konkuro ne estas bulgara e-isto, kiu staras flanke de la komuna strebo al plej altaj produktadrezultoj, por popola bono kaj paco.

Antaŭ la bulgaraj e-istoj staras alta honora tasko — per la internacia lingvo Esperanto konigi la grandajn ekonomiajn, kulturajn kaj socialajn sukcesojn al siaj amikoj tra la mondo; rakonti pri la sincera pacama politiko de Bulgario, pri la internacia interkompreniĝo kaj kunlaboro, pri la paca konkuro inter la popoloj.

Sekvante la ekzemplon de multnombraj siaj kamaradoj, kiuj en la pasinteco batalis en la vicoj de la BKP kun pafilo enmane, oferis ĉian vivon por justa afero, hodiaŭ la bulgaraj e-istoj strebas perfektigi sian laboron, esti ĉiam en la avangardaj vicoj. Kun tiuj centoj kaj jaroj la bulgaraj e-istoj renkontos kune kun la tuta popolo la XII kongreson de BKP — tiun plej superan partian kaj tutpopolan forumon.



La distrikta estraroj (DE) de Bulgara Esperantista Asocio estis kreitaj antaŭ pli ol dek jaroj kun la celo organizi, gvidi kaj kunordigi la tutan laboron pri la propagando,

POR VIGLAJ KAJ AGEMAJ DISTRIKTAJ ESTRAROJ

DIMITAR PAPAŖOV
sekretario de BEA

disvastigo kaj studado de la internacia lingvo E-o sur la teritorio de la koncerna distrikto. Al DE oni donis la respondecan taskon zorgi pri la socialisma, patriotisma kaj internaciisma edukado de la e-istoj, pri ties aktiva partopreno en la socia vivo, en la laboro por florado de nia socialisma patrolando. Paralele kun tio DE devis fariĝi propagandantoj de la atingoj de siaj distriktoj kaj de nia Popola Respubliko en eksterlando.

La ĝisnuna laboro de DE montris, ke ilia fondo estis necesa kaj celkonforma. En vico da distriktoj la E-movado vigligis, estis fonditaj novaj E-societoj. En la plimulto de DE la kadroj akumulis spertojn, stabiligis. Kun pli granda atento kaj zorgo rilatas al DE ankaŭ la lokaj oficialaj organoj.

Iufoje tamen DE ne laboras bone. En la sekvaj linioj ni deziras atentigi pri kelkaj aferoj nepre farendaj de ĉiu DE.

Estas necese plialtigi la rolon de la plenkunsidoj de la DE. Oni devas regule ilin okazigi kaj diskuti la organizan, propagandan kaj instruajn laborojn de la distrikta E-organizaĵo, socian aktivecon de la e-istoj ktp. Tiuj plenkunsidoj devas esti bone preparitaj kun la aktiva partopreno de ĉiuj membroj de DE. Lige kun tio oni devas plialtigi la rolon de la buroo kiel operacia organo de DE. Ĉiu buroo devas regule okazigi kunsidojn, aŭskulti informojn pri la agado de la societoj. Ĉe pli multnombraj DE estas celkonforme formi sekretariaton, kiu traktu kurantajn demandojn dum la tempo inter la kunsidoj, preparu la tagordon de la kunsidoj ktp.

Estas utile formi ĉe DE komisionojn pri la diversaj sektoroj de agado. Ĉiu komisiono devas esti gvidata de membro de DE.

La stabiligo de la distrikta kaj societaj estraroj kiel kolektivaj gvidorganoj estas ligita kun ties prikladra politiko, kun la alligo de la plej konsciaj, kompetentaj kaj bone regantaj la lingvon e-istoj. DE devas

havi ĝustan informon kaj imagon pri la kadroj de ĉiu societo. Samtempe ili devas regule okazigi seminariojn, konferencojn k.a. por freŝigi kaj altigi la nivelon de la kadroj. Ili devas zorgi pri ties lingva perfektigado, pri ties aŭtoritato en la koncerna logloko.

La sukcesa agado de DE altgrade dependas de ilia laŭplana laboro. Ili devas samtempe prepari kaj akcepti tutjarajn kaj sesmonatajn laborplanojn surbaze de la decidoj de la distrikta balotkonferencoj. Tiajn planojn de-

vas havi ankaŭ la burooj kaj la komisionoj. DE devas postuli laborplanojn ankaŭ de la societaj estraroj kaj observi ties akuratan plenumadon.

Aparte grava tasko de DE estas la firmigado de la ligoj kun la amasorganizaĵoj — Patrolanda Fronto, Komsomolo, Sindikatoj, komitatoj de paco, de sobereco, de la virinoj, popolaj legejoj ktp. Por tiu celo ili devas subskribi kontraktojn pri kunagado kun tiuj organizaĵoj. E-o multe gajnos kiel lingvo uzata en la praktiko, se oni metos ĝin serve al tiuj organizaĵoj — por ties internaciaj ligoj.

Hodiaŭ nia tuta libera popolo intense evoluigas la nacian ekonomikon kaj kulturon. La e-istoj ne povas kaj neniel devas stari flanke de tiu ĉi laboro. DE devas esti organizantoj de aktiva partopreno de la e-istoj en tiu ĉi tutpopola laboro. Ili devas doni ekzemplon en laborbrigadoj, ĉe kolektado de refoje uzablaj krudaĵoj, ĉe kolektado de drogherboj k.a. Tio multe altigos la aŭtoritaton de la e-istoj.

Baza tasko de DE estas gvidi la idean-politikan kaj kulturklerigan laboron de la e-istoj. Tiu ĉi laboro devas esti intime ligita kun la konkretaj lokaj kondiĉoj kaj kun la ĝenerala vivo kaj laboro de niaj lando kaj popolo. DE devas uzi diversajn agadformojn por plialtigi la socialisman edukadon de la e-istoj, por ke tiuj povu digne prezenti eksterlande la novan vivon kaj la ĉiufankajn sukcesojn de nia popolo. Paralele kun tio DE devas trovi formojn kaj rimedojn doni metodikan helpon al E-societoj kaj junularaj grupoj, por ke ilia vivo estu pli varia kaj interesa, kun alta ideo kaj estetika enhavo.

DE estas ankaŭ organizantoj de la internaciisma edukado de la e-istoj en sia distrikto. Ili devas direkti la E-societojn al ĝemeligo kun E-societoj el eksterlando, helpi ilin vastigi siajn kontaktojn kun eksterlandaj e-istoj, partoprenigi ilin en diversaj internaciaj aranĝoj ĉe ni aŭ en eksterlando.

Aparte gravaj estas la taskoj de DE lige kun la propaganda kaj instruista laboro. Ili devas ellabori programon de propagando konforme al la lokaj kondiĉoj kaj tradicioj pere de afiŝoj, konstantaj agittabuloj, vitrinoj, ekspozicioj, lokaj radioj kaj ĵurnaloj, amuzvesperoj, koncertoj, kunvenoj, celebros, kinoreklamoj, flugfolioj ktp. — sur tiu kampo estas vasta loko por inventemo. Unuaranga zorgo estas prepari novajn E-lektorojn kaj instruistojn, sisteme freŝigi kaj altigi la lingvan kaj metodikan nivelon de la ekzistantaj pere de seminarioj, pedagogiaj konferencoj ktp. Tiurilate ili devas serĉi ankaŭ la helpon de la Instruista Sekcio de BEA.

DE devas havi ĉiam sufiĉajn informojn pri la E-agado en sia distrikto. Estus bone fiksi konkretan respondecon pri la informado el la konsisto de la buroo. La informoj, ĝeneraligitaj por ĉiu distrikto, devas esti sendataj ankaŭ al CE de BEA. Pri ŝanĝoj de adresoj kaj telefonoj oni siatempe devas sciigi al la CE.

Ĉiam pli kaj pli grava fariĝas la agado de la E-sekcioj, kiuj enkondukas E-on en diversajn profesiojn, en la praktikon. Bone estas formi konsilantaron de la sekcioj el ties prezidantoj, kiu zorgu pri direktado kaj kunordigo de la faka agado.

Grava faktoro por la plua firmigo de la distriktaj organizaĵoj estas la **materiالا bazo**: kancelario, kursejo, kunvenejo, biblioteko, instruhelpiloj ktp. Tie, kie materiala bazo jam ekzistas, oni devas bone ekipi kaj flegi ĝin. Kie materiala bazo mankas, oni obstine klopodu havigi ĝin, serĉante ankaŭ la helpon de la oficialaj gvidorganoj.

Oni ne devas subtaksi ankaŭ la bonan funkciadon de arkivo, kartoteko, librotendado. Regula kontrolado de la stato de la membrokartoj, protokola kaj kasa libroj k.s. ĉiam estas necesa kaj utila. Tio validas kaj pri DE, kaj pri la societaj estraroj. Lige kun tiu ĉi tasko estas grava ankaŭ la laboro de DE pri la financa-jura kulturo de la gvidaj kadroj — tio evitigos erarojn kaj malagrablaĵojn.

La stabiligo kaj bona funkciado de DE estas gravega tasko de nia E-movado. Al ĝi ni devas doni maksimuman atenton.

KLARIGO

Responde al demandoj de multaj legantoj kaj amikoj pri la ĝisnuna ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“, la redakcio donas jenan klarigon.

K-do KUNĈO VÁLEV, kiu 13 jarojn estis ĉefredaktoro de nia asocia organo, multe kontribuis por ĝia pliriĝo kaj varligo, por ĝia disvastigo.

Kiel sciante, en la 40a jubilea kongreso de BEA en Plovdiv li estis elektita Ĝenerala Sekretario de la Asocio. Lia ŝarĝo ege kreskis: li gvidis la propagandan kaj instruistan laboron de BEA.

Dankante sincere pro lia ĝisnuna sindona laboro kiel ĉefredaktoro de „BE“, ni tutkore deziras al li sukcesojn sur la nova altrespondeca posteno.

La redakcio

E-PROGPAMO EN GDR OKAZE DE KULTURAJ TAGOJ DE PR BULGARIO

Schwarzenberg/Raschau La Ĝenerala Mezlernejo „Bertolt Brecht“ organizis en kunlaboro kun la Kulturligo kaj la ĝesperantistoj de u. Schwarzenberg kulturprogramon. La lasta el kvar sukcesaj prezentaĵoj okazis en la kulturdomo „Raschau“.

Pere de diapozitivaj oni prezentis nuntempan Bulgarijon kun ties tradicioj kaj atingoj, kun ĝiaj belaj vidindaĵoj kaj gastamo. K-do Rudolf Eichler raportis pri la Universala Kongreso de Esperanto en Varno 1978 j. Konvenan aspekton al la aranĝo donis versajtoj kaj bulgaraj popularaj kantoj, kiujn plenumis ĝlernantoj kaj kantoklubo ĉe la mezlernejo.

Ce la unua prezentado, kiu okazis en la aŭlo de la mezlernejo en u. Schwarzenberg partoprenis k-dino Christa Lauckner, membro de la subdistrikta konsilantaro kaj la subdistrikta lernejo-konsilantaro.

W. Christ

El J. „Freie Presse“, Schwarzenberg
3.12.1980

DUOBla ESPERANTO-JUBILEO EN POPOVO

La 22an de novembro 1980 la e-istoj de Popovo celebris duoblan jubileon: 70 jarojn de E-movado kaj 60 jarojn de E-societo „Homeco“ en la urbo.

Antaŭ tiu dato oni bone informis la loĝantaron pri la evento per afiŝoj kaj la loka radioreto. En la kulturdomo kolektiĝis multaj e-istoj el la urbo, apudaj vilaĝoj kaj el diversaj urboj.

Komence la amaso ĝenuflakse esprimis sian profundan respekton al la pereintaj en la kontraŭfaŝisma batalo de esperantistoj Mara Taseva kaj Ivan Stojanov, metante florkronojn antaŭ ties monumentojn en la centro de la urbo.

En la kulturdomo porokazan raporton faris Dimităr Canev — sekretario de „Homeco“. Gratulojn prezentis: Ilija Nikolov, prezidanto de UK de Patrolanda Fronto, Dimităr Todorov, prezidanto de DE de BEA en Targoviŝte, reprezentantoj de E-societoj Stefan Georgiev (Sumen), Dimităr Petkov (G. Orjahovica), Hristo Dimitrov (Kubrat), Boris Kavalĝiev (Ruse). En la nomo de la CE de BEA gratulojn prezentis Violin Oljanov, ĉefredaktoro de „Paco“ kaj distingis per oraj insignoj 14 E-veteranojn kaj aktivulojn.

En la antaŭsalono estis aranĝita riĉa ekspozicio el korespondaĵoj de homecanoj.

La sekvan tagon estis organizita ekskurso al v. Jastrebnio, kie la faŝistaj barbaroj mortigis multajn homojn, inter kiuj ankaŭ 6 infanojn. Tie la libera popolo starigis majestatan memor-komplekson.

Dimităr Canev



Honora prezidantaro de la jubilea kunveno en Popovo



BONAJ PERSPEKTIVOJ

POR LA SOFIAJ ESPERANTISTOJ

La prezidanto de la Sofia Urba Estraro de BEA k-do Hristo Kanev estas malnova e-isto — aktivulo de la Bulgara Laborista E-Asocio, aktiva batalanto kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo. Li estis afabla respondi al kelkaj demandoj pri la laboro de la Sofia Urba E-organizaĵo.

— K-do Kanev, kiujn pli konsiderindajn sukcesojn atingis la Sofia Urba E-Organizaĵo de BEA dum la pasinta jaro?

— La Sofia Urba Organizaĵo ampleksas 12 E-societojn — laŭ teritorio, laŭ profesio kaj laŭ intereso. Dum la pasinta 1980 jaro ili disvolvis varian agadon.

Estis organizita refreŝiga kaj metodika kurso, post kiu diplomigis kiel plenrajtaj instruistoj de E-o 16 gekamaradoj. En la ĉefurbo funkciis pli ol 15 kursoj por civitanoj kun ĉ. 200 partoprenantoj. La plejmulto finis sukcese la kursojn per ekzameno.

Nia tasko estas eldoni ankaŭ instruhelpilojn — kaj por Sofio, kaj por la tuta lando. Tiun taskon ni solvis sukcese. Dum la jaro nia poligrafia bazo plue plibonigis, akiris novajn maŝinojn.

Notindajn sukcesojn ni atingis en la sfero de la kulturklera kaj eduka laboro. Oni digne festis tutpopolajn festojn, la naskiĝtagon de Zamenhof, de pereintaj en la kontraŭfaŝisma batalo e-istoj kiel Trifon Hristovski kaj Hristo Kozlev, de elstaraj agantoj de BEA kiel Hristo Gorov, Kunčo Vălev, Rajna Konstantinova, Ivan Keremidčiev. Sole estis celebrata la 50-jara jubileo de la Bulgara Laborista E-Asocio.

Interesa kaj sincera estis la renkontiĝo de la sofiaj e-istoj kun elstaraj agantoj de la E-asocioj en la socialismaj landoj, kun delegitoj de la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco.

La kantluno de la sofiaj e-istoj prezentis riĉan koncerton el E-kantoj en Sofio kaj en la 40a jubilea kongreso de la bulgaraj e-istoj en

Plovdiv. Grandan sukceson havis la koncerto de niaj kantistoj-esperantistoj Maria Angelova kaj Dimităr Denčev en Sofio dediĉe al la 40a kongreso. En la aŭtuno ili havis koncertojn ankaŭ en Blagoevgrad, Bansko, Botevgrad kaj Sliven.

Pli ol 300 sofiaj e-istoj partoprenis la 40an jubilean kongreson.

— Ĉu vi povus menciigi iujn gravajn malfacilaĵojn kaj mankojn en la laboro?

— Nia plej malforta punkto estas la laboro kun la junularo kaj la studentoj. La junularaj E-societoj estas la plej anemijaj. La estraro de la urba organizaĵo ankoraŭ ne trovis la plej ĝustan vojon al la plej dinamika kaj perspektiva parto de la ĉefurba publiko — la junularo.

— Kiujn el viaj aranĝoj kaj entreprenoj, planitaj por 1981 jaro, vi pritaksas plej interesaj? Kiujn taskojn vi starigas antaŭ la sofia esperantistaro?

— Dum 1981j. ni klopodos plenumi la decidojn de la 40a jubilea kongreso. Ni antaŭvidas novan kurson por kursgvidantoj, multnombrajn kursojn por lernado de E-o, varbadon de pli da kursanoj por la someraj internaciaj E-kursoj en Varna kaj apud Drujevo, pli da partoprenantoj en la korespondaj kursoj.

Apartan atenton ni dediĉos al la 1300-jara jubileo de la bulgara ŝtato, al la XII kongreso de BKP kaj ĝia 90-jariĝo.

Ni esperas, ke la nova 1981 jaro estos aparte fruktodona por la sofiaj e-istoj.

Intervjuis: D. Ĥitrov

MATEMATIKISTA KONFERENCO-SIMPOZIO

La Internacia Asocio de Esperantistoj-Matematikistoj (IADEM) organizis enkadre de Vintra Esperantista Fierio en Budapeŝto sian konferencon-simpozion. Partoprenis reprezentantoj el Bulgario, Italio, Hungario, Italio, Francio, Finnlando, FRG, Nederlando, Rumanio.

Okazis komunaj kunsidoj kaj fakkunsidoj de matematikistoj kaj matematikistoj-komputistoj.

Je la nomo de la dommastroj salutparolon faris d-ro Otto Haszpra. Post konciza saluto prelegis pri „Geometria nombro-teorio“ prof. Hános Surányi — prezidanto de la Asocio de Hungaraj Matematikistoj.

En la programo de la komuna kunsido estas ankoraŭ prelegoj pri goniometrio, instruado de matematiko en Hungario, utiligo de komputiloj, kalkul-

tekniko k.a., programadaj lingvoj kaj interlingvoj.

La ceteraj kunsidoj de la simpozio okazis laŭfabe. La partoprenantoj pridiskutis vicon da interesaj prelegoj, koncernantaj la manieron de kunlaboro pri matematikaj edukprogramoj, aranĝon de matematikaj olimpiadoj kaj konkuroj, eldonon de kolekto de distraj taskoj, eldonon de matematikaj lernolibroj en E-o ktp.

La partoprenantoj ankaŭ pridiskutis la problemojn de plua kunlaboro kaj la rezulto estis fondo de Internacia Grupo Informo-Scienca, kies unua laborlingvo estos E-o. Estis elektitaj: prezidanto — prof. d-ro Wolfgang Schmidt, sekretario — d-ro Peter Broczko, estrarano por perkomputistaj esploradoj — Jan Otto De Kat (Nederlando). Samtempe estis fondita komputista sekcio de ISAE.

Pefko Arnaudov

UNIKA RENKONTIGO

Dum la periodo de la faŝismo E-societo „Albatro“ en Varna estis unu el la plej viglaj en la lando. En la urbo estis multaj progresemaj studentoj de la Supera Ekonomia Lernejo, kiuj laŭ la tiamaj politikaj kondiĉoj direktis sian junulan energion al la kulturaj organizaĵoj, inkluzive la E-societon. La klubejo sur strato „27a de julio“ ĉiujespere svarmis je entuziasmo, E-paroloj, kantoj, rido... Ĝi transformiĝis en kulturen centron de la urbo. Ne hazarde la faŝistoj direktis sian malicon kaj dufoje ĵetis bombojn en ĝin.

En novembro pasintjare kelkaj el tiuj entuziasmaj „junuloj“ iniciatis renkontigon de veteranoj partoprenintaj en la vivo de la E-societo en Varna dum la periodo 1934–44 jaroj. Ĝi vekis grandan intereson.

La sabatan vesperon de la 20a de decembro. En restoracio „Sevastopol“ unu post alia eniras grizharaj gevoj. Ĉe la enirejo ilin bonvenigas junaj samideanoj, donacas al ĉiu ruĝan dionton kaj kroĉas memorinsignon. La loko de ĉiu estas anticipe difinita. Okuloj fiksas okulojn. „Via vizago estas konata al mi, ĉu Roza?“ — „Ne, mi estas Nadka“. „Kompreneble, Nadka...“ Jubilaj salutoj, ardaĵ ĉirkaŭprenoj, larmonoj... Ja iuj el tiuj homoj ne intervidiĝis dum 40 aŭ pli da jaroj! Jen venas ne nur nunaj varnanoj, sed ankaŭ gekamaradoj el Sofio, Sumen, Tolbuhin, Pomorie, Bjala Slatina... 55 veteranoj!

La prezidanto de la iniciata komitato Cvjatkio Jolov, vicprezidanto de la DE de BEA en Varna, malfermas la renkontigon. Li memorigas pri tiu malproksima tempo de entuziasmo kaj batalo, kiam la junula vervo venkis la ĉiupaŝajn barojn. Sed nun multaj kamaradoj ne povas partopreni, ĉar ili forbrulis en la kruela batalo... Ĉiuj starante honoras ilian memoron.



En la nomo de la CE de BEA salutis la renkontigon ties sekretario Dimitar Papazov. Li voĉlegis arkivajn dokumentojn, kiuj parolas pri la timo de la faŝisma regpotenco pro la progresema spirito kaj agado de „Albatro“ kaj pri la konstanta observo fare de la polico. K-do Papazov disdonis honorinsignojn al pluraj veteranoj.

En la nomo de la DE de BEA en Varna salutis la veteranojn ties sekretario Saŝa Nedeva. Si substrekiis ilian abnegacian laboron, dank' al kiu nun la E-movado en nia lando havas aŭtoritaton. Sian saluton Nedeva finis per versaĵo „Al la veteranoj“.

En sia salutparolo k-dino Kina Haĝieva, vicprezidanto de la DK por Defendo de la Paco, evidentiĝis la komunajn ideojn kaj la neceson de kunlaboro de ambaŭ movadoj nun.

En la nomo de E-societo „Fajrero“ ĉe la Distrikta Soveto de Varna salutis la renkontigon Lazar Andreev.

Agrable kolorigis la vesperon kantoj kaj deklamaĵoj.

Inter ili veteranoj rakontis interesajn momentojn el sia agado. La ĉefa veteranino — jam okdekjara — Zora Mladenova — Hans rakontis pri la plej fruaj tempoj de la E-Movado en Varna.

Kun granda atento oni aŭskultis la ege interesan rakonton de la ĉefredaktoro de gazeto „Paco“ — la E-veterano Violin Oljanov, kiu tiam estis gvidanto de la eksterleĝa agado de la komsomolanoj ĉe la societo. Li malkovris la nevideblajn tiam risortojn de la vigla aktiveco de „Albatro“, kies motoro estis ĝuste la komsomolanoj.

Ivan Dimčev — Hans, Ivan Smokov, Ĥristo Cvetkov, Georgi Dimov kaj aliaj veteranoj rakontis pri gravaj momentoj el la esperantista antifaŝisma batalo en la pli frua periodo.



Dum la tuta vespero regis bona humoro, ŝvebis la romantika spirito, kvazaŭ ni troviĝis en iu fabela regno de idealismo kaj nobla heroismo.

La sekvan tagon la veteranoj kolektiĝis en la sama loko, de kie ili ordinare estis ekirantaj al ekskursoj antaŭ 45 jaroj — apud la urba turhorloĝo. La decembra suno favoris por la gaja humoro dum la ekskurso al Ganavar Tepe. Denove la arbaron voĉigis la tiamaj kantoj, oni daŭrigas la rememorojn. Kaj, memkompreneble, oni faris multajn fotojn, kiuj estos metitaj apud tiujn el la tridekaj jaroj...

Tio estas vere rimarkinda, netorgesebla renkontigo! Al ni, la junaj esperantistoj, ĝi faris profundan impreson, kaj ni kun granda intereso atendos la duan tian eventon, kiu certe estos ankoraŭ pli amasa kaj interesa.

Saŝa Nedeva



De la 23a de septembro ĝis la fino de oktobro, la 21a Generala Konferenco de Unesko kunsidis en Beogrado. Inter la 3500 partoprenantoj troviĝis la delegitaroj de 153 ŝtatoj-membroj, reprezentantoj de internaciaj organizadoj kaj 69 observantoj de 402 neregistaraj organizadoj, kunlaborantoj kun Unesko. UEA ĉeestis pere de la subskribinto de tiu ĉi raporto.

Nin interesas ĉefe la diskutoj en la Komisiono pri kulturo kaj komunikado, en kiu la ĉefaj temoj estis: la respekto al la homaj rajtoj, cirkulado kaj internacia interŝanĝo de informoj k. a.

Aparta zorgo estis donita al la temo de la komunikado. Por pristudi tiun temon 16-membra komisiono de Unesko sub la gvido de la antaŭa irlandia ĉefministro kaj Nobel-premiito Sean MacBride, dum du jaroj laboris por resumi centon da rekomendoj en libron 360-paĝan, kiun Unesko eldonis en kelkaj naciaj lingvoj sub la titolo „Multaj voĉoj — unu mondo“. Ĝi estis la bazo de longaj kaj fruktonaj diskutoj en Beogrado.

Je la nomo de Universala Esperanto-Asocio mi dum dek minutoj klopodis montri, ke la Raporto de MacBride estas grava, kvankam tre vaga kaj nebula. Ĝi kvazaŭ evitas menci la jam ekzistantan kaj dum preskaŭ jarcento elprovan kaj harditan internacian lingvon Esperanto.

Mi menciis ĝiajn ĉefajn atingojn kaj fine emfazis, ke ĝi estas la solvo preta, atendanta alprenon.

Mi respondis al la tri ĉefaj riproĉoj kutime farataj al Esperanto: 1) Ke malantaŭ la lingvo ne staras iu granda kulturo, iu „propra animo“, kiel malantaŭ la grandaj kulturlingvoj. Jes, vere. Sed tio ja estas, ĉar ĝi estas neŭtrala,

nenion altrudanta. 2) Ke ĝi estas artefarita. Jes, same kiel ĉiu alia lingvo, kiun oni lernas krom la gepatra. Tamen, tiu „artefariteco“ donas al Esperanto la regulecon kaj facilan akireblon, malgraŭ ĝia kompleteco. 3) Ne disvastigita kaj mankas al ĝi fakaj libroj kompare kun la grandaj „mondlingvoj“. Tio estas vero, kiel konstato de la nuna situacio. Sed, ĉu ĝi devas haltigi nin?

PRETIGI LA GRUNDON POR NOVA ELPAŜO!

Tibor SEKELJ

En la sama komisiono ni aŭdis la aserton, ke en certaj regionoj de Afriko 80% de la loĝantaro estas analfabetoj. Sed, ĉar Unesko konsideras la alfabetigon grava, ĝi ekmovas ĉiujn eblajn rimedojn por ŝanĝi tiun situacion. La samo povus okazi pri Esperanto, se Unesko decidus, ke la simpla kaj efika kompreniĝo inter la homoj estas grava.

Sekvis aliaj interparoloj, kiuj nun estis pli favoraj, ol tiuj, kiujn mi havis antaŭ mia interveno. Tio kuraĝigis min kunmeti projekton de rezolucio, kiu rekomendus al la ĝenerala direktoro de Unesko: a) renovigi sian interesigon pri la atingoj de Esperanto laŭ la Rezolucio

de 1954; b) stimuli la publikigon de lernolibroj de Esperanto kaj eldonaĵoj de Unesko en Esperanto; c) inviti ekspertojn de UEA al plua diskuto pri la komunikado; ĉ) rekomendi al la ŝtatoj-membroj la instruadon aŭ intensigon de la instruado de Esperanto en la lernejoj sur ĉiuj niveloj.

Ĉar ĉiun rezolucion devas proponi delegitaro de iu ŝtato-membro, mi komencis serĉi tian proponanton. Kaj mi trovis. La delegitaro de Honduraso — post entuziasma plebido de José Ignacio Mata, membro de la delegitaro, kaj ankaŭ de ĝia ĉefo Cecilio Zelaya Lozano — senhezite kaj kun varmaj vortoj akceptis esti, ĉu kunproponantoj, ĉu subtenantoj, ĉu buŝaj apogantoj dum okazonta diskuto pri la propono. Inter tiuj estis la delegitaroj de Nederlando, Kongio, Aŭstrio, Papua Nov-Gvineo, Norda Koreo kaj Tanzanio; kaj pluraj aliaj devis ankoraŭ konsultigi.

Tamen post nova pripenso de la afero, kun malvarma kapo, mi venis al la konkludo, ke eĉ se la rezolucio estus akceptita, ĝi restus sen granda reala efiko, ĉar nek Unesko, nek ŝtatoj-membroj estas konvene preparitaj por tia paŝo. Do, mi decidis retiri la rezolucion kaj proponi al UEA uzi la proksimajn tri jarojn por vasta kaj intensa preparlaboro, por dum la venonta ĝenerala konferenco de Unesko elpaŝi kun grava propono. Intertempe la delegitaroj de ĉiuj landoj devos scii pri kio temas kaj koni la avantaĝojn de la solvo, kiun ni proponas.

FOR LA NEŬTRONA BOMBO!

Post la unua gazetara konferenco de la nova usona prezidento Ronald Reagan (Rejgan), en kiu li per nova forto komencis kontraŭsovetan kampanjon en Usono, je la politika scenejo aperis la novaj ŝtata sekretario Alexander Haig (Heig) kaj ministro pri la defendo K. Weinberger (Uajnberger).

Sekvante la direkton de militigo kaj akcelo de la vetarmado Weinberger konigis la intencon de la usona registaro ekprodukti kaj lokigi la neŭtronan armilon, kion siatempe prokrastis la eksprezidento Carter (Karter).



Ĉesigi la produktadon de N-bombo antaŭ ĉ. tri jaroj Washington estis devigita pro la energiaj protestoj de la popoloj kontraŭ la apero de tiu nova terura atom-armilo, kiu per sia plialtigita radioaktiveco mortigus ĉiun vivantan estaĵon kaj ne difektus maŝinojn, konstruaĵojn kaj ilaron. La homoj el Okcidenta Eŭropo kaj el la tuta mondo pritaksis la novan armilon kiel timigan minacon al la homaro. Kaj tial ili kategorie deklaris: „For la neŭtrona bombo!“

Sed kiel evidentiĝas el la lastaj eventoj, la trans-oceanaj semantoj de termonuklea morto entute ne rezignis pri siaj planoj trudi al la mondo la dange-ran armilon.

La decido de la usona registaro pri produktado de neŭtrona bombo kaj ties lokigo en Okcidenta Eŭropo provokis maltrankvilegon ĉe la pacamaj homoj en la tuta mondo. Ili ne volas esti senvoĉaj observantoj de danĝera spektaklo, kiun oni ludas laŭ scenaro de la usonaj imperalistoj.

Haim Levi

Alĝu al la Nacia Revuo de E-parolo kaj kanto (3-5 aprilo ĉ. j. en Pazarĝik)! Lasta limdato: 10 marto. Partoprenkotizo: 5 lv. La sumojn sendu al 1303 Sofio, bul. „Aristo Botev“ 97, Dimităr Ivanov Petrov.

LA LINGVA PROBLEMO KAJ ESPERANTO

S-ro Edwige Kernisan, ĝenerala sekretario de la Ŝtata Departamento pri edukado, membro de la delegitaro de Haitio:

„LA STARIGO de neŭtrala komuna lingvo, akceptebla por ĉiuj, estus ne nur utila, sed vere mirinda okazaĵo. Mi kiel haitiano, kaj certe ankaŭ mia registaro, bonvenigus ĝin entuziasme. Ĉar en mia lando la popolo parolas la kreolan lingvon, sed sur oficiala nivelo ni uzas la francan. Kvankam nia lando akiris la sendependecon jam en 1804 j. la franca lingvo nin plue, vole-nevole, igas dependaj de la franca kulturo, de kiu jam estas tempo, ke ni sendependiĝu“.

S-ro Jose Ignacio Mata, sekretario en la Ministerio pri Kulturo kaj Turismo, Honduraso: „ESPERANTO? Jam delonge mi atendas, ke oni faru ion tiurilate en la monda skalo. Mian lingvon, la hispanan, oni parolas en la plej granda kvanto da landoj. Tamen, ekster Latinameriko kaj Hispanio, ĝi ne estas komprenata. Dum vojaĝoj, en oficiala kaj neoficiala komunikado mi forte sentas la bezonon de komuna lingvo. Sed tiun problemon devas preni en siajn manojn unuavice Unesko.“

Mia infano estas nun dujara, sed mi forte esperas ke, kiam ŝi estas plenkreska, ŝi povos travojaĝi la mondon, amikiĝi kun personoj el ĉiuj landoj, uzante unusolan lingvon, Esperanton. Parenteze: ĉu vi povus al mi havigi lernolibron? Mi ŝatus lerni ĝin“.

S-ro S.B. Paik, ĉefo de la Nacia Komisiono por Unesko, Korea Respubliko:

„MI NE PAROLAS Esperanton, sed mi scias ion pri la lingvo kaj la movado. Mi ĉiam havis intereson pri ĝia progreso. Bedaŭrinde, ŝajnas al mi, ke la interesiĝo pri Esperanto malgrandiĝis lastatempe. Sed tio ne devas malkuraĝigi ĝiajn adeptojn. Unesko estas la ĝusta instanco, kiu devus organizi vastan agadon por la enkonduko de Esperanto en la internaciajn rilatojn.“

La enkonduko de tiu internacia lingvo pleje favorus la parolantojn de la t.n. malgrandaj lingvoj, kiuj ne estas parolataj de alilandanoj. Ekzemple mi parolas la anglan lingvon, krom mia gepatra, la korea. Sed mi devis lerni ĝin dum ok jaroj en la lernejo. Tamen, kiam mi diskutas kun anglalingvano, mi ĉiam sentas min malplifavora, ĉar dum mi baraktas kun la ideoj unuflanke, kaj kun la lingvo aliflanke, mia kunparolanto transformas la ideojn en vortojn nature kaj sen malfacilaĵoj“.



D-ro P. EOE — ĉefa scienca kunlaboranto

KIEL APERIS LA SLAVOJ

La demando pri la deveno de la slavo kaj pri ties prapatrujo ankoraŭ ne estas solvita. Tio klarigas la viglan intereson, kiun historiistoj, arkeologoj, etnografoj, lingvistoj kaj antropologoj montras al ĝi. Lastatempe la antropologio posedas sufiĉe da novaj faktoj, kiuj permesas elformi pli konkretajn konceptojn pri tiu grava por ni demando. Ĉi-sube ni donas artikolon de d-ro Boev — estro de la sekcio pri etna antropologio en la Instituto de Morfologio ĉe la Bulgara Akademio de Sciencoj.

La homo aperis antaŭ ĉ. 1 miliono da jaroj en la tropika zono de Afriko kaj verŝajne de Azio. La unuaj homoj eble havis malhelajn okulojn, harojn kaj haŭton pro la masigo de la pigmento melanino en ili. Tio estis necesa, por ke ili ŝirmu sin kontraŭ la forta sunradiado.

En daŭro de centmiloj da jaroj la homoj multigis kaj komencis loĝi ne nur en la tropika terzon, sed ankaŭ malproksime en la nordo. Ju pli da homoj estis pli proksime al la Ekvatoro, des pli ilia haŭto fariĝis pli nigra pro la amasigo de melanino. Tiel en posta tempo formiĝis la negroida kaj nigra raso. Tiuj, kiuj ekloĝis en nordaj regionoj for de la Ekvatoro kaj proksime al la Norda Poluso, ne bezonis multan melaninon, tial la haŭto, la haroj kaj la okuloj komencis perdi ĝin. Tiu depigmentado estis necesa, por ke la organismo povu utiligi malabundan sunlumon kaj varmon. Tiel iom post iom, en la fino de la paleolitiko (antaŭ ĉ. 30 000 jaroj) formiĝis la nordaj tipoj de la eŭropa raso, por kiu estas karakterizaj blanka haŭto, bluaj okuloj kaj blondaj, kelkfoje flavruĝaj haroj. Tiu procezo okazis inter la 50a kaj 60a paraleloj de norda latitudo en Eŭropo kaj Okcidenta Siberio. Tiutempe Norda Eŭropo kaj partoj de Centra Eŭropo estis kovritaj de glaciarto.

Sovetaj sciencistoj lastatempe malkovris en la basenoj de Volga, Oka kaj Kama spacon de tero liberan je glaciarto. Tie la arkeologo Okladnikov trovis postsignojn de homo, vivinta antaŭ 25 000 jaroj. Tio donas motivon opinii, ke la plej malnovaj loĝantoj de Orienta Eŭropo

estis el la norda branĉo de la eŭropa raso. Plenmotive oni povas akcepti, ke ili prezentas la nordan branĉon de la hindoeŭropaj popoloj, kiu aperis en Antaŭa Azio kaj la Balkana Duoninsulo kaj iom post iom okupis ankaŭ la liberajn je glacio nordajn lokojn. Tiuj ĉi depigmentitaj, blondaj praaŭoj de la hindoeŭropa lingva komunaro estas praaŭoj de latvo-baltoj kaj germanoj. Do, la plej malnova prapatrujo de tiuj etnoj devas esti serĉata en Orienta Eŭropo, eble ankaŭ en Okcidenta Siberio.

Ĉi antropologo kaj eĉ nespecialisto estas impresata de la fakto, ke ĉe ni, en Bulgario, oni renkontas reprezentantojn de la norda raso en tre malgranda procento kompare kun la ceteraj slavaj popoloj. Iuj sciencistoj emas supozi, ke en sia bazo la bulgaroj havas pli multe da traco kaj prabulgara ol slava sango. Ĉu tio povas esti vera? Kie „malaperis“ la slavo, okupintaj kiel grandega maro la tutan Balkanan Duoninsulon? Al tiu scienca enigmo povas respondi la lastaj antropologiaj esploroj en nia lando sur skeleta materialo el la novŝtona epoko, t.e. de antaŭ 8—9000 jaroj ĝis nun, komparataj ankaŭ kun donitaĵoj el la najbaraj landoj, precipe el Sovetunio kaj Rumanio.

La bulgaraj slavo estas parto de la orienta slava grupo, kiu eniris la originon ne nur de nia popolo, sed ankaŭ de rusoj, blankrusoj kaj ukrainoj. Komence tiu orienta slava grupo loĝis ĉirkaŭ la riveroj Pripet kaj Dnepro, poste dislokiĝis orienten, norden, okcidenten kaj suden. Tio estis triboj parencaj al la jam konataj slavaj triboj severjanoj, drevljanoj, vitiĉoj, kriviĉoj, smoljanoj. Survoje al la Balkana Duoninsulo la slavo iom post iom miksiĝis kun la loka loĝantaro, asimilis kaj skavigis ĝin. Tiuj miksaĵoj ankaŭ nun estas rekoneblaj laŭ la antropologiaj tipoj. Jam sur la teritorio de hodiaŭa Ukrainujo (Bukovino), en Moldavujo kaj Rumanio la slavo asimilis la trovitajn tracojn loĝantaron kaj tial ricevis trajtojn, kiuj diferencigis ilin de la ceteraj slavaj branĉoj. Kiel sciante el niaj esploroj, la pratracoj kaj tracoj en Rumanio kaj Bulgario estis precipe de la mediteranea kaj dinara raso. Ili diferencis de la slavo pro sia iom malhelaj okuloj, haroj kaj haŭto. La procezo de „malheliĝo“ de la slavo pro asimilado al tracoj plifortigis depende de ilia moviĝo Suden. Tiel, iom post iom, la bulgaraj slavo fariĝis antropologia miksaĵo de blondaj rastipoj kun malhela kolorigitaj (mediteraneaj) rastipoj kaj komencis diferencii de la ceteraj slavo per sia eksteraĵo, dum ili plene konservis siajn slavajn kulturon kaj lingvon. Tiel miksitaj kun tracoj kaj poste ankaŭ kun prabulgaroj (el la alano-turkoj), tiu ĉi plej multnombra parto de la bulgara etnogenezo — la slavo, donis la fundamenton de la bulgara stato, ekzistanta jam 1300 jarojn.



NEFLEKSEBLA KIEL ŜTALO

70a NASKIĜTAGO DE TODOR SOFRONIEV

„Mi scias, ke kuglo minacas min pro mia antifaŝista agado, sed mi ne fleksos la genuojn. Tiel deklaris antaŭ siaj proksimuloj Todor Sofroniev.

Li estas unu el la gvidantoj de la laborista E-movado en Plovdiv. Mi konatiĝis kun li, tuj post kiam li eksoldatiĝis, en la fino de 1931 j. Oni elektis lin en la estraro de la sekcio de la Laborista E-Asocio. Kiel tia li faris multon por amasigi kaj aktivigi la Movadon en tiu granda cantro de la laborista klaso. Ĉiuvespere en la klubejo oni gvidis kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Pri la amaseco kaj aktiveco de la organizo oni povas juĝi laŭ la disvastigo de la eldonadoj de LEA, precipe de „Internacia Laborista Kampana Korespondanto“. Nur en Plovdiv ĝi havis ĉ. 800 abonantojn!

La 19an de majo 1934 j. konspira oficira ligo renversis la registaron de la burĝaj partioj kaj eksterlegiĝis ĉiujn politikajn kaj progresemajn organizojn. Ankaŭ LEA estis eksterlegigita. Ĝi tamen ne obeis al la faŝista dekreto kaj daŭrigis sian agadon.

La estraro de la sekcio decidis eldonadi nelegalan E-gazeton, kiu enhavu informojn pri organiza vivo, novaĵojn el fremdlando kaj precipe el Sovetio, beletran kaj poezian fakon. Ni titolis la gazeton „Sturmulo“. Todor farigis membro de la redakta komitato. Li kunlaboris per artikoloj, eseoj kaj versaĵoj sub pseŭdonimo „Todsol“. La gazeto aperadis regule dum unu jaro. En majo 1935 j. la polico spionis la presejon kaj unu el la kolportistoj, kaj tio kaŭzis la areston de la redakta komitato. Nur Todor Sofroniev eskapis. Dum kelkaj monatoj li estis devigata kune kun aliaj eksterleguloj kaŝi sin en Rodopo, dormi en arbaroj sur malseka tero, malsatadi. Fine la polico trovis la spurojn de la nelegala grupo kaj sukcesis aresti ĝiajn membrojn. Sofroniev estis venigita en la distriktan prizonen de Plovdiv.

Ni, redaktoroj kaj presistoj de la gazeto, aperis antaŭ la tribunalo, kiu donis al ni maljustajn verdiktojn. La tribunalo karakterizis „Sturmulon“ kiel komunistan, kaj la Leĝo por Defendo de la Stato estis severa.

Ni restis pli ol du jarojn en diversaj prizonoj,

post kio oni amnestiis nin. Tamen la polico ne lasis nin trankvilaj. Ĝi trovis por ni ekzilejojn unue en la nordorienta parto de la lando, poste en la nigramara urbeto Nesebăr. Oni liberigis nin apenaŭ en majo 1939.

Dum la mondmilito ni malofte vidis unu la alian pro okupiĝo en diversaj sektoroj de la kontraŭfaŝisma batalo.

La unuan de junio 1944 jaro la partizana taĉmento, al kiu mi apartenis, bivakis en la arbaro Pepelaŝa en Rodopo. Noktomeze ni aŭdis daŭran pafadon sur la proksima monto-



1938 j. Plovdivaj esperantistoj, proskribitaj en Deljormano, (nordorienta parto de Bulgario).

De maldekstre: Todor Iŝev, Hristo Gorov, Todor Sofroniev, Ivan Vergov. Sidanta: Boris Puŝpalov el Peruŝtica.

kresto Jurukalan. Tie kutime ĝendarmoj embuskis kontraŭ niaj kurieroj. Ni supozis, ke ankaŭ nun okazis io simila. Tamen post kelka tempo al ni venis la sciigo, ke dum tiu nokto oni masakris 34 arestitajn kamaradojn. Inter la masakritoj troviĝis ankaŭ Todor Sofroniev, la nefleksebla kamarado. Por fari la kadavrojn nerekonablaj la murdistoj surŝutis ilin per kaŭŝika sodo.

Todor Sofroniev pereis en sia 34a jaro nur kelkajn monatojn antaŭ la venka antifaŝisma ribelo. Sed lia vivo kaj batalo ne estis vanaj. En la fundamenton de nia popola ŝtato ankaŭ li enmasonis sian ŝtonon.

ĤRIMA

PRI LA NEOLOGISMOJ

Neologismo el vidpunkto de Esperanto estas vorto, kiu „strebis“ eniri ĝian leksikon.

Cu oni devas fermi la pordon antaŭ ĝi?

Ian lumon por respondi al tiu ĉi demando povas doni la analizo de la procedo de adopto de la lingvo.

La adopto pasas laŭ du vojoj. La unua estas la vojo de adopto de la primaraj vortoj. Tiu ĉi vojo estas la vojo de aŭtomateco. La adoptanto de la lingvo devas adopti la primarajn vortojn aŭtomate. Kiam la instruisto diras al la lernanto, ke iu objekto nomiĝas tablo, la lernanto ne povas demandi: „Pro kio?“ La pro-kio-demando estas demando pri la logikeco. La primara vorto, kiel signo, ne povas esti logika aŭ mallogika. Ĝi estas tia, kia ĝi estas. Se Zamenhof estus decidinta nomi la saman objekton azeno, la lernanto estus devinta enkapigi al si ne la vorton tablo, sed vorton azeno. Inter la vorto kaj la vortigita objekto ekzistas nenia logika ligo. Oni ne devas miksi ĉi tiun demandon kun la demando pri la motivo de la vorto. Evidente Zamenhof havis motivojn elekti por nomo de la objekto ne la vorton azeno, sed la vorton tablo. Tamen tio ne estas pro la logiko de la objekto, sed pro prefero, rezultigita de plej diversaj konsideroj. La primara vorto en sia rilato al la signata de ĝi objekto estas fakte idiomio, t.e. lingvero logike neklarigebla. Kaj la adoptanto de la lingvo devas aŭtomate, sen pro-kio-demando, enkapigi al si ĉi tiun vorton-idiomon. Nature li povas utiligi plej diversajn metodojn por pli facila enkapigo (Ĉe-metodon, mnemonikon, aliajn metodojn). Tio tamen ne ŝanĝas la karakteron de la primara vorto kiel idiomon, kiu devas esti aŭtomate, t.e. sen pro-kio enkapigita.

La dua vojo de adopto de la lingvo estas la vojo de adopto de la kombinoj (kunmetaĵoj, frazoj) de la primaraj vortoj. Tiu ĉi vojo estas la vojo de la logikeco, de la pro-kio. Ĉio, kio eniras en la konscion laŭ tiu ĉi vojo, devas esti produkto de la logiko. Kiam la lernanto, jam enkapiginta al si la primarajn vortojn, kombinas ilin, ekzemple en la formon „la tablo estas granda“, kaj la instruisto diros al li, ke tiu ĉi kombino estas neĝusta, la lernanto jam povas demandi: „Pro

kio?“ Nun la adopto de la lingvo estas en la fazo de la logikeco. Ĉiu adoptaĵo devas esti rezulto de logika operacio.

La samaj vojoj estas ankaŭ vojoj de adopto de la etnaj lingvoj.

Karakteriza trajto de la internacia lingvo Esperanto tamen estas tio, ke la unua vojo de ĝia adopto estas pli malfacila, dum la dua estas pli facila. Tiurilate Esperanto diferencas esence disde la etnaj lingvoj, ĉe kiuj la unua vojo — la vojo de la aŭtomateco — estas pli facila ol la dua — la vojo de la logikeco, kvankam ĉe la etnaj lingvoj laŭ la unua vojo eniras multe pli da materialo ol ĉe Esperanto. Tio ne estas rezulto de la principa diferenco inter Esperanto kaj la etnaj lingvoj. La kaŭzo estas la historia momento, en kiu troviĝas Esperanto. Dum la ano de la etna komunaro vivas en la atmosfero de sia gepatra lingvo kaj estas, tiel diri, ĉiumomente, jam de sia beba aĝo, bombardata per la vortoj kaj kombinaĵoj de sia gepatra lingvo, ne estas tia la situacio de la parolanto de Esperanto. Lia ebleco esti „bombardata“ per la vortoj kaj kombinaĵoj de Esperanto estas sporada. Li ne povas troviĝi ĉiumomente en medio de parolantoj de tiu lingvo. La kondiĉoj de funkciigo de la mekanismo de la aŭtomateco estas malfavoraj por li. Do la vojo de aŭtomateco estas por li pli malfacila vojo. Por li la vojo de la logikeco estas pli facila.

Ĉefa celo de Esperanto en la nuna historia momento estas serĉi kaj trovi manierojn de facila adopto. Tio signifas redukti kiom eble la vojon de aŭtomateco je konto de la logikeco.

La neologismoj estas lingveroj, kies vojo al la konscio de la lernanto estas la vojo de la aŭtomateco, do la pli malfacila vojo. Ilia eniro malfaciligas la adopton de la lingvo, faras ĝin malfacila. Jen pro kio oni devas strebi limigi ilian eniron. Jen pro kio oni devas rezisti al ili. Ne pro tio, ke ili estas „fremdaj“, ke ili „malpurigas“ la lingvon, sed pro tio, ke ili malhelpas al la praktikaj (taktikaj aŭ eĉ strategiaj) celoj de Esperanto en la nuna momento.

L. Mihajlov

PARE — 81

Laŭ jam estiĝinta tradicio, sesan fojon, je la 11—12 de aprilo ĉ. j. en u. Ruse okazos la ĉi-jara PARE. La programo antaŭvidas solenan kunvenon, belartan programon kaj interkonan vesperon kun bankedo (sabate) kaj renkontigon de kooperativanoj-esperantistoj kaj urbrigardado (dimanche).

Partoprenkotizo: 8 lv. Limdato por alsendo de poŝt-mandatoj, aligiloj: 20a de marto.

Por pliaj informoj, aligiloj kaj transpagado turnu vin al: 7000 Ruse, p. k. 425. Ivan Slavov Ivanov — DE de BEA. Telefonnumeroj: de 8 ĝis 17 h. 3—23—00 (ofica) kaj post 18 h. 2—64—00 (hejma).

ESPERANTISTA GEEDZIĜO

En la kulturdomo de urbo Kubrat (Norda Bulgario) je la 13a de decembro 1980 okazis la solena ceremonio de la internacia E-geedziĝo de ELIZABETA ZALESIAK (Pollando) kaj RIDVAN SABANOV (el Kubrat).

Ni gratulas la paron kaj bondeziras feliĉon kaj prosperon!

La redakcio de „BE“





MEMORIGO PRI RIMARKINDA ESPERANTO-POETO

El Moskvo venis malĝoja sciigo: Forpasis rimarkinda lirikisto Konstantin Mihajlovič Gusev, elstara soveta e-isto, dediĉinta al la Esperanta originala kaj traduka poezio multajn jarojn de sia spiritorika vivo kaj grandan parton de sia poeziema koro.

Gusev naskiĝis la 31-an de januaro 1916 en urbo Voroneĵ. Tie li finis la geografian-geologian fakultaton en 1939 j. Jam pli frue ĉe li vekigis la amo al poezio kaj li verkis siajn unuajn lirikajn poemojn. En gazetoj kaj revuoj komencis aperi poeziaĵoj de promesanta poeto. Poste li publikigis du apartajn librojn (1946 kaj 1961) kun originalaj kaj tradukitaj poemoj en rusa lingvo. La poezia verkado kunigis kun verva ĵurnalista agado — gazetara korespondanto, redaktoro, publicisto. En 1950 j. oni invitis lin labori en la redakcio de la centra partia organo „Pravda“ (Vero), kie li okupis la postenon de vicfakestro. Preskaŭ tri jardekoj li laboris en tiu mondfama plej aŭtoritata soveta ĵurnalo, fordonante siajn kapablojn al ĝi kaj al la nobla profesio de progresema ĵurnalist.

Konstantin Gusev ellernis Esperanton dum la tridekaj jaroj. Kiel sciante, tiam eksplodis en Hispanio civila milito, celanta neniigi la junan hispanan demokratian respublikon. Gusev ekkorespondis kun hispanaj e-istoj. En la koro de la juna studento naskiĝis granda

simpatio al la batalanta hispana popolo kaj al ĝia lingvo. En Voroneĵ li publikigis rusingvajn tradukojn de verkoj de la grandaj hispanaj poetoj Lorka kaj Maĉado. Liaj tradukoj de Lorka aperis ankaŭ en E-o (Moskvo, 1968).

Multajn jarojn de E-traduklaboro li dediĉis al verkoj de klasikaj rusaj kaj ukrainaj poetoj, al modernaj sovetaj poetoj.

Travivinta la ruinigon de sia naskurbo fare de la hitleraj barbaroj, Gusev farigis arda adepto de paca vivo, interkomprenigo kaj fratiĝo de la popoloj en la tuta mondo. Li agadis aktive en la Komisiono por Internaciaj Ligoj de Sovetiaj E-istoj. Taksanta alte la agadon de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), li kunlaboris en ties eldonadoj.

Mi havis la feliĉon esti proksima amiko de Gusev kaj mi neniam forgesos la homecon, fontantan el lia koro kaj tipa slava fizionomio.

Kune kun li mi partoprenis du UK de E-o en Sofio (1963) kaj en Madrido (1968). Hispanio delonge ĝemis sub la botoj de la faŝista Franko, sed Gusev kun granda intereso rigardis de proksime la hispanan teron kaj popolon, kaj kredis profunde en ties hela estonteco.

Lastan fojon mi vidis Gusev en 1978 j., gastante al li kaj lia simpatia edzino Ljudmila Ivanovna. Dum tagmanĝo ni tuŝis la eventualan eblecon pri eldono de aparta libro kun la du poemoj pri Lenin — de Majakovskij kaj de Voznesenskij, tradukitaj en E-on, tutpretaj por publikigo. Mi opinias, ke oni devas fari ĉion eblan plenumi tiun vivrevon de la rimarkinda E-poeto.

Konstantin Gusev ne plu estas inter ni. Sed lia literatura heredaĵo riĉigis la originalan kaj tradukan E-literaturon. Nome per ĝi li daŭre vivos kaj batalos vice kun ni por la grandegaj kaj noblaj celoj — homa progreso kaj monda paco.

NIKOLA ALEKSIEV
Honora Prezidanto de MEM

E-TRADUKISTOJ DE UKRAĤINIO SEMINARIIS

La tradukista sekcio de Ukraina Respublika Filio de ASE organizis en Harkov seminarion. Partoprenis 50 e-istoj el 10 loĝlokoj, plejparte el Ukrainio. Estis ankaŭ gastoj el Moskvo kaj Rostov ĉe Dono.

En la programo de la seminario estis prezentitaj jenaj prelegoj: „La celoj kaj la taskoj de la tradukista sekcio ĉe URF de ASE“ (Cibulevskij D. M.), „Pri la tradukado de beletra literaturo“ (Samodaj V. V.), „Ritmoj en la E-poezio“ (Tokarev B. V.), „Tradukado de sciencteknikaj tekstoj“ (Gončarov A. J.) kaj „Kiel tradukadi sciencan fikcion“ (Muraškovskij J. V.).

Enkadre de la seminario estis resumita la unua literatura konkurso por ukrainanoj. La konkurson partoprenis 12 personoj el 8 loĝlokoj per 11 poeziaĵoj kaj 10 tradukitaj fabeloj.

La tradukista sekcio ĉe URF de ASE anoncas novan konkurson en du branĉoj:

I. „Originala humura rakonto“.

II. „Tradukita humura rakonto“.

La konkurson povas partopreni ĉiuj e-istoj. Kondiĉoj:

a) Prezenti la konkursaĵojn ĝis la 20a de septembro 1981 je adreso: Cibulevskij D. M., str. Ĉajkovskogo 25, kv. II, SU-310024 HARKOV, Ukrainio, USSR (por la konkurso); b) Prezenti la tradukon nur el la ukraina aŭ el la rusa lingvoj kun nepra aldono de la originala teksto;

c) Prezenti la konkursaĵojn subskribitan per pseŭdonimo, ĉar la konkurso estas sekreta. La veran nomon kaj adreson de la aŭtoro oni enmetu en apartan koverton, subskribitan per la sama pseŭdonimo kaj sendu ĝin kun la konkursaĵoj.

D. Cibulevskij,
gvidanto de la tradukista sekcio

SCIENCA AGADO KAJ ESPERANTO

EMINENTA HUNGARA SCIENCISTO-ESPERANTISTO EN SOFIO

Fine de la pasinta jaro venis Sofion pro ofica laboro d-ro OTTO HASZPRA (HASPRA) — profesoro de hidromekaniko kaj hidroliko en la Budapeŝta Teknika Universitato. D-ro Haszpra ĝuas la famon de elstara fakulo, eksperto de Unuigintaj Nacioj pri hidromekaniko.

Dank' al la helpo de prof. Miloslavov en la Supera Instituto por Arkitekturo kaj konstruado estis organizita prelego de d-ro Haszpra. Antaŭ 50 gestudentoj kaj dekoj da profesoroj, docentoj kaj asistentoj el tiu instituto li parolis pri la temo „La traŝiroa akvoĵeto“. Dum unu horo per siaj prelego, diapozitivaj kaj respondoj al starigitaj demandoj d-ro Haszpra tre lerte, klare kaj kompetente prezentis tiun temon, kiu tiel rekte tuŝas ankaŭ nian larĉon — la akvoĵeton de Nigra Maro laŭ Danubo kaj Rejno ĝis la Atlantika Oceano. Tiu 3500-kilometra vojo kun grandega internacia signifo estos finkonstruita en 1985 j.

Estante arda e-isto d-ro Haszpra faris sian interesan prelegon kaj la respondojn en la internacia lingvo E-o. Tio forte impresis studentojn kaj instruantojn. La aŭskultantej perkrede levinkigis pri la bonegaj kvalitoj de E-o kiel lingvo de scienco kaj tekniko.

Prof. d-ro Otto Haszpra estis afabla respondi ankaŭ kelkajn demandojn de nia redakcio.

— *Estimata d-ro Haszpra, ni scias, ke la scienca agado de la budapeŝtaj e-istoj staras je ege alta nivelo. Ĝi estas ekzemplo imitinda ĉiutage. Ni petas doni al niaj legantoj kelkajn informojn pri la komenciĝo kaj esenco de tiu agado.*

— Antaŭ dudek jaroj estis fondita teknika sekcio de Hungara E-Asocio (HEA) Ĝi tamen okupiĝis plejparte pri organiza agado kaj tial mortis. En 1972 j. ni, sciencaj agantoj-esperantistoj, decidis denove komenci, ĉi-foje konkretan agadon sen fondi specialan novan organizon, sed uzi ekzistantan — la E-klubon „Konkordo“. Do, enkadre de „Konkordo“ ni komencis aranĝi ĉiumonate du sciencajn vesperojn. Ili okazis en la domo de la kuracista-sanitara sindikato. La programo estas regule anoncata en „Budapeŝta Informilo“. Jam okazis pli ol 135 sciencaj vesperoj (dum ĉiuj sezonoj escepte la someron). Ili estas regule vizitataj de kelkdeko da e-istoj — fakuloj kaj laikoj. Post ĉiu prelego okazas diskutado.

Preskaŭ samtempe kun tiu ĉi klubo scienca E-agado komenciĝis ankaŭ ĉe la medicinistoj — en hospitalo „Laszlo“. Tie funkcias E-kurso. Ĉiujare oni organizas grandan sciencajn vesperon kun kelke da prelegoj.

— *Ĉu vi povus montri iun alian scienca E-aktivecon de la e-istoj?*

— Jes, sendube tia aktiveco estas nia scienca E-libroeldonado. En 1974 j. ni eldonis tute modestan 4-paĝan kajeron kun sciencaj prelegoj, kiu havis la titolon „Komunikadoj“. La sekvan jaron aperis „Sciencaj Komunikadoj“ — la jam vaste konata kolekto de sciencaj materialoj, plajparte prelegoj en „Konkordo“. La temoj — precipe el la natur-sciencoj kaj la tekniko, sed estas ankaŭ lingvistikaj kaj aliaj. Kompreneble, multaj materialoj estas popular-sciencaj. La kolektoj „Sciencaj Komunikadoj“ estas sufiĉe ampleksaj, dense presitaj.

Nun en la eldonplano de HEA staras kelkaj titoloj sciencaj kaj popular-sciencaj, kiujn ĝi eldonos libroforme dum la sekvaj jaroj. Ni esperas, ke ankaŭ UEA aktivigos tiurilate. Memoriginde, ke pri tiu grava afero ia sciencis-

toj parolis sufiĉe en la UK en Varno. UEA devas antaŭvidi financajn rimedojn por la celo.

— *Ĉu estas ia scienca aktiveco inter la studentoj-esperantistoj?*

— Antaŭ 2—3 jaroj tia agado komenciĝis en la universitato „Eötvös Lorand“. Ekfunkciis scienca rondo. Poste tia rondo formiĝis ankaŭ en la Budapeŝta Teknika Universitato. Ĝi funkcias enkadre de la junulara organizo. Okazis eksperimento pri bazaj fenomenoj de la fiziko, kiu vekis grandan interesiĝon inter la studentoj. Oni lernas specialajn vortojn, terminojn. Tuj al ni venis la ideo fari faklingvan lecionaron, kiu laŭdezire povas esti aldonata al la ordinara lingvokursoj. Nun ankaŭ aliaj grupoj eklaboris, aparte vigle la komputistoj. Oni atendas gravajn rezultojn de ilia laboro.

La organizado de la hungara E-junularo tre ŝatas tiun aktivecon kaj direktigas al ĝi. En novembro okazis junulara E-konferenco en Debrecen, kiu traktis la demandon pri antaŭenigo de la faka aplikado de E-o. La konferenco malfermis la vicrektoro de la debrecena universitato, elstara fizikisto, membro de la Hungara Akademio de Sciencoj. Li rilatas tre favore al E-o kaj speciale al la apliko de E-o en la diversaj branĉoj de la scienco.

Nun kelkloke en Hungario formiĝis E-grupoj por scienca agado. Tio estas ege grava por altigi la aŭtoritaton de E-o en nia nuntempo, por altiri la sciencistojn al la E-movado.

— *Kion vi bondezirus al la bulgaraj studentoj kaj junularo?*

— Mi ĝojas, ke en la nuna estraro de UEA ĝuste la juna bulgara inĝeniero Petăr Todorov respondecas pri la fakagado. Ni kredas, ke tio efikos aparte fruktodone sur la bulgarajn studentojn kaj junularon. Inter ili devas komenciĝi vigla aplikado de E-o en la scienco kaj tekniko. En la epoko de la scientechnika revolucio la faka agado estas plej grava por akceptigo de E-o. Do, mi plej sincere bondeziras sukcesojn al la bulgara E-junularo sur tiu kampo.

Intervjuis: Kunčo Válev

POPOLORKESTROJ EN TORUN

La sukceso de la pasintjara Internacia Renkontiĝo de Popolaj Orkestroj kun apliko de E-o kiel laborlingvo, organizita de la Etnografia Muzeo de Torun, instigis la organizanton okazigi duan tiaspecan renkontiĝon. Ĝi okazos je la 29—31 de majo 1981. Por la sukceso de tiu ĉi renkontiĝo konsentis kunlabori la Urba Konsilantaro de Torun kaj Pola E-Asocio.

La aranĝon povas partopreni originalaj popolaj muzikgrupoj de 2—6 personoj, kiuj prezentas muzikon de sia regiono, uzante tipajn, karakterizajn instrumentojn. Estus bone, se kune kun la muzikistoj partoprenus dancistoj (-inoj) aŭ kantistoj (-inoj).

Se la membroj de la muzikgrupo ne scipovas E-on, ili nepre devas esti akompanataj de E-interpretisto. Li per E-o kontaktos kun la organizantoj kaj prezentos la programon de la grupo.

La organizantoj gastigas senpage la partoprenantojn de la vespermango la 28an ĝis la tagmango la 31an de majo. Krom tio oni ricevos poŝmonon. La grupoj partoprenos programon en la kadro de la „Tagoj de Torun“. Vojaĝkostojn la partoprenantoj pagas mem.

Landaj kaj lokaj E-organizaĵoj estas petataj kunlabori, por ke la renkonto realiĝu kaj estu fruktodona. Detalajn informojn oni povas ricevi de: Etnografia Muzeo, Waly Sikorskiego 19,87—100 Torun, Pollando.

Ĉar ne ekzistas multaj instancoj, kiuj aplikas E-on, estus bone, se la e-istoj iom kunlaborus, por ke la renkontiĝo estu sukcesa. Ni informu direktistojn de popolorkestroj kaj prizorgantojn de muzeoj pri tiu ĉi aranĝo.

La renkontiĝo en Torun povas kontribui por pli aktiva aplikado de E-o en la internaciaj rilatoj.

N. N.



M. Elenova plenumas ciganajn romancojn

JUNULARA SEKCIO EN RUMANIO

Meze de septembro pasintjare en u. Timișoara okazis la 3a jarkunveno de rumanaĵ e-istoj. Ĉeestis cent reprezentantoj de ĉ. 30 lokaj E-kluboj. Post profunda traktado de la agado en junularaj medioj oni decidis fondi junularan sekcion de la Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko, kiu post 1978 j. estas la rumana E-organizaĵo. Mariana Cemicova—Buca el Timișoara farigis gvidantino de la nova sekcio. Respondeculon pri kunlaboro kun TEJO oni elektis Florian Bociort (Timișoara).

GRANDA PRISPORTA EKSPOZICIO

Kvankam la granda mondskala sporta evento — la Olimpikoj '80 en Moskvo — jam estas nur agraba rememoro, la E-klubo an u. Nijnevar-tovsk (Tjumena regiono) organizis antaŭ nelonge grandan ekspozicion dediĉitan al la Olimpikoj kaj al la sporto en Sovetunio kaj en la socialismaj landoj.

En la urba kulturpalaco „Oktobro“ estis elmontrita 12 grandaj tabuloj kun pli ol 200 afiŝoj, gazetoj, salutleteroj, libroj, dokumentoj, kartoj, fotoj kaj aliaj objektoj, ricevitaj el multaj eŭropaj landoj, inter kiuj unuavice el Bulgario (d-ro Nikola Denev, d-rino Donka Sekirova, Metodi Garev k.a.).

Pri tiu interesa aranĝo de la Nijnevar-tovska E-klubo oni publikigis informojn en la kvar urbaj ĵurnaloj.

La ekspozicio, vizitita de pli ol 15 000 urbanoj vekis ankaŭ grandan intereson pri E-o. Cent kvindek urbanoj (precipe gejunuloj) esprimis deziron lerni la Internacian Lingvon.

La E-klubo en Nijnevar-tovsk intencas organizi ĉi-jare novan ekspozicion kun materialoj pri la pacbatalo de la popoloj el socialismaj kaj el aliaj landoj de la terglobo. La e-istoj el u. Nijnevar-tovsk atendas taŭgajn materialojn por la nova ekspozicio kaj anticipe dankas elkore al ĉiuj, kiuj reeĥos al ilia alvoko.

Adreso: Gorodskoj Esperanto-klub, SU-626440 g. Nijnevar-tovsk, Tjumenskaja obl., ul. Omskaja 12—3, USSR.

BELEGAJ IMPRESOJ

Budaĉesto estas bela ne nur somere! Ankaŭ dum la vintro ĝia beleco allogas multe da eksterlandanoj. En la fino de decembro pasintjare en la ĉefurbo de Hungario por 10a fajo geesperantistoj el diversaj landoj kolektiĝis por renkonti la Novan 1981an jaron en amika esperantista atmosfero. La 10an VEF-on (Vintra Esperantista Fierio) partoprenis ĉirkaŭ 250 personoj (plej multe gejunuloj) el Hungario, Pollando, Ĉeĥio, Jugoslavio, Italio, Rumanio, Francio, Germanio, Bulgario k.a.

Estis homoj, kiuj ĉiujare regule ĉeestis tiun ĉarmigan aronon* de hungaraj e-istoj. Pro tio dum la interkona vespero iuj el ili ricevis memorajojn kaj honorilojn de la organizantoj.

La Teatron vesperon, okazintan la 29an de decembro, partoprenis hungaraj popolaj ensembloj, knabina koruso, rumana teatro el Timișoara kaj ankaŭ tri bulgaroj: la profesiaj gekantistoj Galja Kostova (el Jambol), Veselin Damjanov (el Sofio) kaj la amatore kantanta ciganajn romancojn Mariana Elenova (el Sofio).

Interesa kaj gaja estis la Silvestra balo. Ĝin partoprenis ĉ. 350 personoj. Multe da muziko, dancoj, ŝercoj. Gajaj kaj ĝojaj vizagoj, feliĉaj ridetoj. En 23a h. la bulgaroj (laŭ nia kutimo) kantis la bulgaran himnon. En 24a h. la E-himno plenigis la grandan halon en la kulturdomo „Lang“, kie okazis ĉiuj programeroj. Ĉiuj salutis unu la alian, kisis, bondeziris. . . Regis vere frata atmosfero! La balo finiĝis je la 5a h.

Ni dankas al Budaĉesta Organiza Komitato kaj bondeziras al ĝiaj membroj dancigi tiun tradicion — ĉiujare pli interese, pli riĉe, pli bele!

M. E.

Dank'al la magia ŝlosilo E-o mi jam sukcesis dum mia 30-jara esperantista vivo „malfermi la pordojn“ de multaj eŭropaj landoj. Ĉiuj miaj vojaĝoj estis belaj kaj neforgeseblaj, ĉie mi trovis afablan, varman akcepton kaj bonajn amikojn. Sed la gastamo, kiun mi renkontis pasintjare en la bela norda lando Danio, superis ĉiujn miajn atendojn.

Mi vizitis tiun landon kiel gasto-preleganto, invitita de Dana E-Asocio. La temo de miaj prelegoj estis „Ĉu vi konas la landon de la rozoj“, dediĉita al la 1300-jara jubileo de nia ŝtato.

Ekde la unua rigardo impresis min la verdfręŝaj bonege flegataj ebenaj kampoj, la puraj stratoj, la pitoreskaj kolorigitaj kaj ornamitaj domoj, la skulptaĵoj en la ĝardenoj kaj parkoj. Mia restado estiĝis renkontiĝo kun popolo bonege edukita, honesta kaj kultura, ĝentila, sciamas kaj parolema, disciplinita kaj ŝatanta la higienon. La danoj estas pacamaj. Ili montras fortan politikan intereson, volas helpi al la subpremataj kaj neevoluintaj landoj.

Nenie oni flagas tiel multe, kiel en Skandinavio. Flagon oni hisas ĉiumotive — kaj mi miris pri tio. Grandan impreson faris al mi la pitoreska ĉefurbo Kopenhago kaj ĝiaj majestaj konstruaĵoj, la mezepoka fortikaj urbo Fredericia, la naskiĝurbo de la mondfama fabelisto Andersen — Odense, la belaj havenurboj Arhus kaj Alborg. Mi estis feliĉa atingi kaj vidi la „Danan Nazon“, kie renkontiĝas la ondoj de Balta kaj Norda Maroj — la markoj Skagerak kaj Kategat.

20 TAGOJN EN LA LANDO DE LA 500 INSULOJ

Tamen sendube sen la bona organizo de mia restado fare de la estraranoj de DEA kaj DEFA, sen la aktiveco de ĉiuj aliaj gesamideanoj, membroj de E-kluboj, invitintaj min prelegi, mi sentus min fremda en tiu lando. Ili faris ĉion kun la celo pliagrabligi mian restadon kaj glate funkciigi miajn prelegojn. Aparte mi ĝojas, ke la organizantoj aranĝis mian prelegon ĉe antaŭ la membroj de la societo por Dana—Bulgara Amikeco en u. Arhus kiam en la moderna urba



Inter danaj amikoj

biblioteko estis malfermita ekspozicio de koloraj fotoj pri Bulgario. Mi prelegis ankaŭ antaŭ ĝelernantoj de la lernejo en la komunumo Tolve. Ĉiuj ĉie aŭskultis min atente, kun intereso trarigardis la murtabulojn, sur kiuj mi ekspoziciis bildojn pri nia 1300-jara jubileo, pri niaj naturo, popolkutimoj, tu-

rismaj lokoj ktp. Oni direktis al mi demandojn. Poste en diversaj lokaj ĵurnaloj aperis favoraj informoj kaj artikoloj pri miaj prelegoj kaj pri nia Patrujo.

Mi ne povas tamen prisi-lenti: kvankam la kultura kaj materiala vivnivelo de la danoj estas altaj, en la lando ekzistas ankaŭ iuj problemoj strangaj kaj nekonataj ĉe ni. Granda parto de la junularo ne plu povas trovi taŭgan laboron kaj pro tio okupiĝas pri narkotomanio, krimaferoj, Plimultiĝas la alkoholuloj. Kvankam la skandinaviaj landoj estas konataj per tio, ke eksterlandanoj povas facile eniri ilin, fakte mi travivis malfacilaĵojn. La lingardistoj severe kontrolis mian pasporton, postulis, ke mi montru revenbileton. Eble ili timis, ke mi volas resti kaj labori en la lando.

Estinte 20 tagojn en Danio mi konstatis, ke la idealoj, la sentoj kaj la revoj de la danoj estas la samaj kiel ĉe la bulgarioj. Kiel ni ili bonvenigas ĉiam kun granda ĝojo la printempon kaj la sunon. Kiel ni ili admiras la florojn kaj ĉiun belacon de la naturo. Kiel ni ili deziras la pacon kaj malamas la militon. Inter la dana esperantistaro mi fartis bonege; ankoraŭfoje mi konvinkigis, ke E-o vere kunigas homojn per sia nobla ideo pri amikeco. Rusa proverbo diras: „Ne havu cent rublojn, sed havu cent amikojn.“ En la bela norda lando de la 500 insuloj mi trovis kaj ekhavis multajn geamikojn. Kaj per tio mi estas ne nur riĉa, sed ankaŭ feliĉa!

Cvjetko Toĉorov

NOVA LITERATURA E-REVUO

En oktobro pasintjare aperis la unua numero de „Fonto“ — la nova monata beletra 42-paĝa revuo, kies ĉefredaktoro estas William Auld (Britujo). La fondita Fonto-entrepreno en Brazilo okupiĝas pri la kompostado kaj presado de la revuo.

En la unua numero de „Fonto“ aperis verkoj de 20 aŭtoroj el 13 landoj, 14 originalaj kaj 7 tradukitaj, 5 en prozo kaj 16 poeziaĵoj. Inter ili elstaras la korskua rakonto „La eta ruĝa albumo“ de nia ŝanino Rajna

Konstantinova.

Citaĵo el la enkondukaj vortoj de la ĉefredaktoro: „Larĉante tiun ĉi revuon, nia celo estas akceli la beletran literaturon en E-o. Ni esperas aperigi tradukojn el plej diversaj lingvoj kaj kulturoj. Ni esperas, ke dank'al nia kuraĝigo la beletra literaturo en E-o trovos kaj disvolviĝos, kiel ĝi faris dum la meritplena epoko de niaj ŝatataj antaŭuloj.“

Ni bondeziras sukceson al „Fonto“!

ЗА ВАШЕТО ЕЗИКОВО
УСЪВЪРШЕНСТВУВАНЕ

ПАРАЛЕЛЕН ТЕКСТ

РАН БОСИЛЕК

МАМА МИ Я ОПЛЕТЕ

Имал Златко шапчица. Майка му я оплела. Целичката червена. Сложил си я един ден, тръгнал да се разхожда.

Задало се насреща къдроглаво съседче. Рекло му:

— Вземи това ножценце! Дай ми твоята шапчица!

Но Златко му отвърнал:

— Шапката си не давам!

— С това ножче, братленце, десет шапки ще взема!

— Може и сто да вземеш, но моята не давам! Мама ми я оплете!

И Златко си заминал. Срещнал момък с маймунка.

— Хей, момченце, почакай! — извикал му момъкът. — Вземи тая маймунка! Дай ми твоята шапчица!

— Шапката си не давам!

— Простичко си, момченце! За тази маймунка двайсет шапки ще взема.

— Може двеста да вземеш, но моята не давам. Мама ми я оплете!

Златко пак си заминал. Срещнал рибар по пътя. Носел риба в торбичка. Спрял Златко. Казал му:

— На ти рибка живичка! Дай ми твоята шапчица!

— Шапката си не давам!

— Дай я, дай я, момченце! Рибката е безценна. Каквото и поискаш, дарява те веднага.

Златко не се поамил. И тоя път отговорил:

— Шапката си не давам! Мама ми я оплете! Погледнал го рибарят. Погледнал и рибката. Погалил я. Рекъл й:

— Златоперке моя, нека тук дойде най-добрата плетачка с най-чудните шапчици!

Не бил още издумал, явила се плетачка.

— Златко, златно момченце, дай ми твоята шапчица, а ти сложи моята! Виж колко е хубава! С нея ставаш юначен.

— Хубава е, леличко, и твоята шапчица, но от тази, що нося, по-хубава не зная. Мама ми я оплете!

Усмихнал се рибарят. Засмяла се довольно хубавата плетачка. Прегърнала момчето.

— Ти си добро момченце! Честита да е майка ти, че така я обичаш! Пази си шапката, но вземи и моята!

Взел я Златко доволен и радостно извикал:

— Да си жива, леличко, с юнашката шапчица голям юнак ще стана, но ще пазя цял живот и моята шапчица, че я мама оплете.

POR VIA LINGVA PEREKTIĜO
PARALELA TEKSTO

RAN BOSILEK

PANJO ĜIN TRIKIS AL MI

Havis Zlatko ĉapeton. Lia patrino ĝin trikis. La tuta ruĝa. Surmetis ĝin Zlatko iun tagon kaj ekiris promenadi.

Aperis renkonte buklohara najbarido.

— Prenu tiun ĉi tranĉileton! Donu al mi vian ĉapeton!

Sed Zlatko rediris:

— La ĉapeton mi ne donas!

— Kontraŭ tiu tranĉileto, fraĉjo, dek ĉapojn mi ricevos!

— Eĉ cent vi povus ricevi, sed la mian mi ne donas! Panjo ĝin trikis al mi!

Kaj Zlatko foriris. Renkontis junulon kun simieto.

— Hej, knabeto, atendu iomete! — ekkriis al li la junulo. — Prenu ĉi tiun simieton! Donu al mi vian ĉapeton!

— La ĉapeton mi ne donas!

— Naŭva vi estas, knabeto! Por tiu simieto dudek ĉapojn mi ricevos.

— Eĉ ducent vi povus ricevi, sed la mian mi ne donas! Panjo ĝin trikis al mi!

Zlatko denove foriris. Renkontis survoje fiŝiston. Li portis fiŝon en saketo. Haltigis Zlatkon kaj diris al li:

— Jen por vi fiŝeto viva! Donu al mi vian ĉapeton!

— La ĉapeton mi ne donas!

— Donu ĝin, donu ĝin, knabeto! La fiŝeto estas senvolora. Kion vi deziras, tion ĝi tuj donacos al vi.

Zlatko ne lasis sin forlogi. Ankaŭ ĉi-foje li respondis:

— La ĉapeton mi ne donas! Panjo ĝin trikis al mi!

Alrigardis lin la fiŝisto. Alrigardis ankaŭ la fiŝeton. Karesis ĝin kaj diris:

— He, fiŝeto mia ornaĝilo, ĉi tien venu la plej bona trikistino kun la plej mirindaj ĉapetoj!

Ne estis li finparolinta, kaj aperis trikistino.

— Zlatko, orkora knabeto, donu al mi vian ĉapeton kaj surmetu la mian! Vidu kiom bela ĝi estas! Per ĝi vi fariĝos brava.

— Bela estas, onklinjo, ankaŭ via ĉapeto, sed pli belan ol tiu, kiun mi havas, mi ne konas. Panjo ĝin trikis al mi!

Ekridetis la fiŝisto. Ekridis kontente la bela trikistino. Ĉirkaŭbrakis la knabeton.

— Vi estas bona knabeto! Feliĉa estas via patrino, ke vi tiel ŝin amas! Gardu vian ĉapeton, sed prenu ankaŭ la mian!

Prenis ĝin Zlatko kontenta kaj ĝoje ekkriis:


— Estu viva vi, onklinjo, per la bravula ĉapeto granda bravulo mi iĝos, sed mi gardos tutan vivon ankaŭ la mian, ĉar ĝin panjo trikis.

Tradukis el la bulgara: Marin Băcev



- En 1979 j. Pola E-Asocio havis 7 810 membrojn. Inter la ĉefaj urboj elstaris Bydgoszcz kun 1560 membroj.
- Post prezento de tezo kun mallonga parto en E-o Juan Carlos Ruiz Sierra, vicprezidanto de la Madrida E-Liceo, doktrinis kiel inĝeniero de minejoj.
- La nederlandlingva E-lernolibro de Zondervan kaj Manders aperis en grandlitera eldono por uzantoj, kies vidkapablo estas malforta.
- Fondigis en Arhus (Danlando) Infana Esperanto. Klubo Dek (mezaĝo de la anoj: 10 jaroj), je la adreso CB, Bancgardsgade 19, DK 8000 Arhus C, Danlando.
- En 1980 j. okazis kvar televidaj elsendoj pri E-o en Kolombio. En Bogota funkcias pluraj E-kursoj. La 2-a Tutamerika Kongreso de E-o okazos venontjare en la kolombia ĉefurbo.
- En sia nova serio „Ne nur hobia!“ Hungara Radio disaŭdigis duonhoran intervjuon kun la kolektanto de E-libroj kaj revuoj Károly Fajsz.

DISTROJ



Enskribu ĉiudirekten:

1. Jararo, prezentanta gravan momenton en la historio.
2. Herbo, kreskanta en Ĉinio, Japanio kaj Nordameriko, kies rizomo estas uzata en la medicino.
2. Multjara herba kreskaĵo, kies radikoj estas uzata en la medicino.
4. Longa meblo por pluraj sidantoj (radiko).
5. Po ok personoj.

JUBILEO DE SOVETA VETERANO

Nia soveta amiko Sergej Nikolaevič Krajnov atingis jam la honorplenan aĝon de 75 jaroj.

Multaj bulgaraj e-istoj persone konas la estimatan sovetan veteranon, gastintan en nia lando antaŭ kvin jaroj. Dum sia propaganda turneo tra Bulgario li sukcese lektiis pri la medicina kreskaĵo hipofeo, havanta grandan popolekonomian signifon.

Kun E-o Krajnov konatiĝis en sia junaĝo. Studento de agrikulturo en Kubano, li jam estis veterano de E-societo en u. Krasnodar. En 1923 j. li daŭre studas en la fama Agrikultura Akademio „Timirjazev“ en Moskvo. Samtempe Krajnov funkcias kiel membro de Centra Komitato de SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unuiĝo).

En 1958 j. li iniciatis la preparadon de ĝardenista teknologia vortaro en ses lingvoj, inkluzive E-on. Parto de tiu vortaro, kiu ampleksas multajn fakojn de agrikultura organizado kaj ekonomio de ĝardenmastrumado, aperis en 1972 j. en la eldonata en Bulgario esperantlingva agrikultura „Internacia Bulteno“.

S. N. Krajnov estas konstanta reprezentanto de Sovetunio en la Internacia Ligo de Agrikulturaj Specialistoj-Esperantistoj (ILASE) ekde 1964 j. De 1963 j. li estas elektata seninterrompe kiel vicprezidanto de Moskva Internacia E-Klubo (MIEK). Samtempe estas iniciatinto kaj senŝanga prezidanto de la soveta veterana E-klubo, fondita en 1961 j.

Al la nelacigebla soveta patrioto, arda esperantista veterano, propagandisto de soveta-bulgara amikeco ni bondeziras pluan viglan agadon.

Korajn gratulojn, estimata jubileulo!

Buntaj Faktoj

La „muelado“ de la akvo ne estas senperspektiva okupo. Vere anstataŭ pistujo sciencistoj el Estona SSR uzis deintegrilon — specialan „muelilon“ kun roto, kiu rotacias tre rapide. Oni konstatis, ke en la „muelita“ akvo la truto kreskas pli rapide kaj el cent ĝiaj frajagrajnoj elkoviĝas naŭdek fiŝidoj (kaj ne kvindek); ankaŭ la akvoplantoj kreskas pli bone.

En kio konsistas la sekreto de la „muelita“ akvo? Oni povas supozi, ke la molekuloj de la akvo ĉe ordinara kondiĉoj kunigas en ĉenetojn, kiuj poste longiĝas, tameniere la akvo „maljunigas“ kaj komencas malrapide penetri la histojn de plantoj kaj animaloj.

Inter la novaj modeloj de famaj firmaoj, prezentitaj en la internacia ekspozicio de aŭtomobiloj en Parizo, altiris la atenton ankaŭ eble la plej malgranda aŭto en la mondo, nomata „Parko“. Ĝia kreinto estas Djupor — mekanikisto el Orienta Francio. Djupor opinias, ke la aŭto havos sukceson pro sia eksterordinara ŝparemo de brulaĵo, pro siaj etaj dimensioj, kiuj faras ĝin taŭga ĉe garaĝado. En ĝi povas sidi kvar veturantoj. La cilindro de la motoro havas amplekson 500 cm³. Ĝi funkcias per dizelbrulaĵo kaj elspezas ne pli ol 3 litrojn por 100 km.

TRA LA GAZETARO

En j. „Gálábovská Iskra“ — u. Gálábovo (15. IV. 1980): informo pri ekspozicio „Lenin — standardo de la paco“, aranĝita de la loka E-societo per ekspozitoj, riĉevitaj pere de E-o.

En j. „Naroden drugar“ — Jambol (5. V.): informo de Iliana Ilieva pri la distrikta E-konferenco.

En la sama ĵurnalo (14. VI.): sub la titolo „70 jaroj de la E-movado en Jambol“ aperis 5 materialoj — artikoloj de Dimo Trudoljubov kaj Penka Papazova, skizo pri la veterano Conjo Pančev k.a.

En j. „Borba“ — Veliko Tárnovo (8. V.): informo pri la distrikta konferenco de BEA.

En la sama ĵurnalo (22. V.): artikolo de Pavlina Popivanova kaj Emilia Josifova pri la heroo pasinteco de la loka gimnazio „Kiril kaj Metodi“ kun informoj ankaŭ pri la iama lenejana E-societo „Flamo“.

En la sama ĵurnalo (12. VI.): ampleksa artikolo „Duonjarcento de Laborista E-Asocio“ de Olga Canova.

En j. „Otečestven Glas“ — Plovdiv (15. V.): informo pri okazonta celebrego dediĉe al Hristo Gorov, prezidanto de BEA kaj eksurbano de Plovdiv, lige kun lia 70-jariĝo.

En la sama ĵurnalo (17. V.): longa informo pri la celebrego de Hr. Gorov.

En la sama ĵurnalo (20. V.): sub titolo „E-kroniko“ tri informoj — pri la ligoj de la loka E-societo „Kulturo“ kun la e-istoj de Leningrado, pri japana E-libro, prezentanta la terurajn de la atombomba atako kontraŭ Hiroŝimo kaj pri la antaŭstaranta UK de E-o en Stockholm.

En la sama ĵurnalo (10. VI.): sub titolo „E-novajoj“ du informoj — pri la korespondaj ligoj de la studenta E-societo en Plovdiv kaj pri renkontiĝo de la veteranoj de laborista E-movado en GDR.

En la sama ĵurnalo (1. VII.): sub titolo „E-novajoj“ tri informoj — pri distrikta E-konferenco, pri nova E-bulteno en USSR, pri E-lernilo en Anglio de G. Panamski.

En j. „Rabotničesko Delo“ — Sofio (16. V.): skizo de G. Panamski pri la fotoamatoro kaj arda e-isto Nikola Peev el v. Gurovo, distrikto Sofio.

En la sama ĵurnalo (26. XI): artikolo de Nano Kjuĉukov, vicprezidanto de BEA, pri iama gazeto „Drum“, eldonata en u. Ugărin, en kiu aperis tradukoj el E-o kaj priesperantaj artikoloj.

En j. „Etropolski Pregled“ — Etropole (30. V.): artikolo de Maria Angelova pri Todor Peev, eminenta bulgara klerig-aganto kaj revoluciulo kontraŭ la otomana jugo, prezidanto de la iama ĉefurba E-societo „Aŭrore“ en Sofio.

En j. „Botevgradski Plamák“ — Botevgrad (31. V.): informo pri vizito de ĉefurbaj e-istoj en Radotina — naskiĝvilaĝo de la heroo-esperantisto Trifon Hristovski. Florkronon sur la tombon de Hristovski oni metis laŭ peto de la franca e-isto Jan Lezan, lia leter-amiko.

En la sama ĵurnalo (7. VI.): sub titolo „Ni estas batalantoj en la unueca batalo“ — letero de la franca e-isto Jan Lezan memore al Trifon Hristovski.

En la sama ĵurnalo (16. VIII.): detala informo pri la agado de la loka E-societo „Trifon Hristovski“.

En j. „Bankja“ — Bankja (1. VI.): artikolo de N. Tomov pri Petro Budenov, e-isto pereinta en la batalo kontraŭ la faŝismo.

En j. „Podem“ — Vjatovo (2. VI.): impresoj de Jordan Kalinov pri vojaĝo tra Sovetunio.

En j. „Zarja na komunizma“ — Loveĉ (3. VI.): informo pri fondo de lernejana E-societo en Loveĉ.

En la sama ĵurnalo (12. VII.): skizo pri la E-veterano Vasil Markov.

En la sama ĵurnalo (9. VIII.): vojaĝimpresoj de Cočo Kolarov pri Pollando.

En la sama ĵurnalo (14. kaj 26. VII.): informoj pri gastado de pola E-grupo en Loveĉ.

En j. „Dunavska Pravda“ — Ruse (4. VI.): informo de B. Kavalĝiev pri solena enmanigo de la ordeno „Kiril i Metodi“ al E-societo „Libero“ en Ruse.

En la sama ĵurnalo (18. VI.): informo pri la distrikta E-konferenco.

POPOLAJ PROVERBOJ

Vivo sencela estas kiel homo senkapa. (Asiria)

Kiu rigardas malantaŭen, ne trapasos la vojon. (Tatara)

Ne pritaksu la sakon laŭ ĝia etiketo. (Franca)

Kiel ajn estus ornamita, la azeno restas azeno. (Taĝika)

La prezon de la aĵoj vi komprenas, post kiam vi perdis ilin. (Rusa)

Pli bone perdi la ankron ol la tutan ŝipon. (Angla)

Arbo, anatemia de la popolo, sekigas. (Abhaza)

La ellasita fiŝo estas ĉiam granda. (Ĉina)

Nun divenu vi, knabino:
bareto ne por vino —
jen duono estas blanka,
jen duono estas flava. . .
Ĝi devenas ne de bovo —
tiu estas ja la . . .!

Marin Băcevi



Ĉu vi povas trovi la diferencon?

Bulgario

E-societo serĉas korespondantojn por siaj diversaj kaj diversprofesiaj membroj. Komuna adreso: Esperanto-societo „David Sasonov“, 4230 Asenovgrad. Gimnazianoj 16-jaraj — kun ĉi. Adreso: Gimnazio „Lenin“, 9—B klado, 4230 Asenovgrad.

Hristo Rastev — str. „Asen Zlatarov“ 6,6155 Pavel Banja (kun ĉi pri ĉi). Respondo certa.

Novaj e-istoj — kun ĉi pri ĉi. Komuna adreso: Esperanto-kurso, selo Aleksandrovo, Loveŝko. Respondo certa.

Sovetunio

15—17-jaraj gelernantoj — tutmonde. Adreso: Esperanto-rondo, Tallinna 44, Keskkooll, Keskuse 18, SU-200029 Tallinn, Estonio.

11—17-jaraj gelernantoj — kun samaguloj. Adreso: Esperanto-rondo, Tallinna 10, Keskkooll, Rautee 73, SU-200016 Tallinn, Estonio.

15-jara lernantino — kun ĉi pri ĉi. Adreso: USSR 454097 Celjabinsk, ul. Okrujnaja, d. 54, kv. 60, Siŝkova Tanja.

Novaj e-istoj — pri ĉi, bk. Komuna adreso: USSR, 660417 Irkutsk-17, str. Akademickeskaja, d. 16, kv. 26, Matveeva Nina (por la Esperanto-klubo).

22—40-jaraj e-istoj, novaj kaj malnovaj (instruistoj, inĝenieroj, oficistoj — tutmonde pri ĉi. Komuna adreso: USSR 626400, Tjumsenskaja obl., Surgut, Dom Kulturi „Energetik“, Esperanto-rondo.

Frenjova Olga — ul. Melik—Karamova — d. 74, kv. 12, Surgut — 2, Tjumsenskaja oblast, 626400 USSR (17-j. lernantino — matematiko, sporto, moderna muziko, vojaĝoj).

Komencantoj 13 — 16-jaraj — kun ĉi kolektive kaj individue: Pionir-palaco, Esperanto-rondo 454200 Celjabinsk. USSR.

Veroŝka Selivanova — Kadaka tee 173-38, 200026 Tallinn.

Jakal Klara — ul. Gorkij 26, Vilok 295530 (28-j. instruistino).

Ilercgh Ildiko — ul. Lenin 77, Vilok 295530 (36-j. instruistino).

Beneš Ljubov — ul. 8 de Marto, 177-11, 456317 Miass — 17 (23-j. laboristino).

Bondar Nikolaj Dimitrievič — ul. Lenina 3, Maksimovka, Kremenčug-regiono, Poltava-distrikto, Ukrainio SU-315378 (23-j. studento — kun samaguloj).

Zaika Sergej — pr. 50 let. VLKSM 72, kv. 78, Harkov — 118, SU-310118 (29-j. inĝeniero — bk, E-libroj, teatraĵoj).

Edgar Homič — ab. jaŝĉik 4, 350 000 Krasnodar (muziko, historio, literaturo, bk, ekslibrisoj, kalendaretoj ka).

Kolčar Magdalina — ul. Ŝerbakova 25, 295560 Korolevo (16-j. lernantino — bk).

Serdecna Natalia Ivanovna — selo Pervozvanovka, Ĉutovskij rajon, Poltavskaja oblast, 315062 Ukrainio (23-j. laboristino — pri ĉi, bk — kun bulgaroj).

Vika Kuznecova — Florilor 18/2, obŝĉ. PKTI, Kiŝinev, 277045 USSR (16-j. lernantino — pri arto, pm — kun e-istoj el Grekio, Hispanio, Anglio, Meksikio, Kanado, Kubo, Francio, Japanio).

Olga Kropotova — Moskovskij prospekt 12/3-31, 277045 Kiŝinev (15-j. lernantino — pri arto, nacia kulturo ka).

МЕЖДУНАРОДНА ЕСПЕРАНТСКА ШКОЛА

1090 София, п. к. 791

тел. 32-40-68

ПРОГРАМА 1981 Г. — ВАРНА

Месец	Период	Такса за българи	Такса за чужденци
1. април	1—14	112 лева	154 лева
2. април	16—29	112 лева	154 лева
3. май	3—16	126 лева	182 лева
4. май	17—30	126 лева	182 лева
5. юни	1—14	140 лева	210 лева
6. юни	16—29	140 лева	210 лева
7. юли	1—14	98 лева	168 лева
8. юли	16—29	98 лева	168 лева
9. август	1—14	98 лева	168 лева
10. август	11—30	140 лева	200 лева
11. септември	1—14	140 лева	210 лева
12. септември	16—29	140 лева	210 лева
13. октомври	1—14	126 лева	182 лева
14. октомври	16—29	126 лева	182 лева
15. ноември	1—14	112 лева	154 лева
16. ноември	16—29	112 лева	154 лева
17. декември	1—14	112 лева	154 лева
18. декември	15—28	112 лева	154 лева
19. 29 дек. 1981—2 ян. 1982		70 лева	100 лева

Всяка смяна: опознавателна и прощална вечер, курс по есперанто, плаж, автобусни екскурзии до Варна (с посещение на етнографския музей, аквариума, мавзолея на Владислав Варненчик, местността „Побити камъни“), Балчик (ботаническата градина и бившия дворец на румънската кралица), Толбухин (етнографския музей), излет до Аладжа манастир, прожекции на цветни диапозитиви, дискотеки и др.

